EL POPOLA ĈINIO

中國報道 1979 6

Aŭskulti rakonton

Interesoj de Infanoj

Ludi por la kunuloj

Ludi pupojn

En kantado
kaj dancado

Vere interese!

Infanoj amindaj

Dum leciono de pentrado

Ankaŭ mi prezentu al vi kanton.



En ludo kun pupo

Naĝado



Sunbano

Konduktorino Liu Shiying

En la vagonaro de Xuzhou al Qingdao laboras konduktorino Liu Shiying, kiun multe laŭdas pasaĝeroj pro ŝia afabla kaj zorga servo al ili, precipe al blinduloj, surduloj, maljunuloj, malsanuloj kaj infanoj.

En la nova Ĉinio, la konduktoroj estas respektataj same kiel aliaj servantoj. Dum sia servado de sep jaroj Liu Shiying ricevis 19,000 laŭdajn leterojn kaj ofte estis simpatie admonata de pasaĝeroj iom ripozi, kiam ŝi ŝvitis de streĉa laboro en la vagono. Ŝia diligenta laborado portas al la pasaĝeroj varmon kaj komforton kaj per prizorgoj kaj laŭdoj la lastaj instigis ŝin ankoraŭ pli multe ami sian profesion.

Purigado



Ordigi valizojn



Inter siaj koleginoj

Akcepti premion

Trinku teon!

Helpo al maljunulo

"Legu bildogazeton!"

EL POPOLA ĈINIO 中国报道

1979
N-ro 6
(249)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio
Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Sur la Kovrilo:

P. 1 a. Lerni kalkuladon
b. Ĉu vi aŭdis?

P. 4 Guilin (olepentraĵo) de **Luo Erchun**

Enhavo

Pri niaj infanoj 2
Por sana kreskado de infanoj 8
Esperanto en Radio Pekino 11
Ili meritas la nomon de modelo 14
Forstokultura teknikisto 17
Belaj sonoj el la koro 19
Fremdlandaj amikoj lernas tajĝiĉjuan 22
Tajĝiĉjuan 24
Bona bofilino 25
TRA ĈINIO: La Okcidenta Lago en printempo . . . 27
La loko de amo en la vivo (Daŭrigo) 31
AMIKECO: Tridek jaroj en la ĉina kamparo 36
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: En vilaĝo de ŝarba-oj 41
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Restaĵoj de primitiva socio de Hemudu 45
KURANTAJ AFEROJ 48, 52
ESP-NOVAĴOJ 50

Pri Niaj Infanoj

LA jaro 1979 estas la Internacia Infana Jaro. Kiel vivas la infanoj de la nova Ĉinio? Kiujn sukcesojn atingis Ĉinio en la bonstatigo, sanprotekto kaj edukado al la infanoj? Kiujn aktivadojn ĝi faros en la infana jaro? Kun tiuj demandoj nia raportisto intervjuis Zhang Shuyi, ĉefsekretariinon de la Tutlanda Infanprotekta Komitato de la Ĉina Popolo, kaj ŝi parolis pri tiuj demandoj.

Raportisto: La estonteco de la homaro apartenos al la infanoj, tial la problemo de infanoj estas grava problemo zorgata de ĉiuj homoj. Ĉe la okazo de la Internacia Infana Jaro, bonvolu iom paroli al niaj legantoj pri la nuna stato de la infanoj de Ĉinio.

Zhang Shuyi: Bone. Mi, kiel laborantino por infanoj, tre ĝojas, ke mi havas ŝancon paroli al niaj amikoj pri la ĉinaj infanoj. Ĉinio estas lando relative postiĝinta en ekonomio. Depost sia fondiĝo, la nova Ĉinio ĉiam zorgas la infanojn kiel daŭrigantojn de la revolucia afero. Nia konstitucio kondiĉas: "Geedzeco, la familioj, patrinoj kaj infanoj estas protektataj de la ŝtato." "La ŝtato aparte zorgas pri la sana kreskado de gejunuloj kaj geknaboj." Nia principo de infana eduko estas kulturi la novan generacion en laborulojn, plene disvolvitajn en moralo, klereco kaj korpo, kun socialisma konscio, kaj amantajn siajn patrujon, popolon, laboron, sciencojn kaj komunajn havaĵojn.

En kulturado kaj edukado de la infanoj antaŭ ĉio ni multflanke plifortigas infanprotektan laboron, por ebligi al la infanoj sane kreski.

Rap.: Do kiujn rimedojn oni aplikis por tio?

Infanoj ludas en ole-palmaro.

Kiel bonapetite

Zhang: La infana sanprotekta afero ampleksas multajn flankojn. Laŭ la laborprotekta regularo zorgo estas donita al la gravedaj virinoj. Depost la fondiĝo de la nova Ĉinio, la higienaj institucioj kulturis grandan nombron da akuŝistinoj por disvastigi novan akuŝigadon tra la lando, precipe en foraj montvilaĝoj kaj ekonomie postiĝintaj regionoj de nacimalplimultoj.

Fakte sanprotekta reto por la infanoj formiĝas nun en Ĉinio. En grandaj kaj mezaj urboj servas al infanoj sanatorioj, hospitaloj kaj higienaj esploraj institucioj; en guberniaj kaj distriktaj urbetoj funkcias infanaj aŭ virinaj-infanaj kuracejoj; kaj en bazaj unuoj aŭ vilaĝoj laboras malsanpreventaj kaj sanprotektaj grupoj. La supre menciitaj organizoj respondecas pri sanprotekta laboro de infanvartejoj kaj infanĝardenoj de sia distrikto. En iuj unuoj kaj distriktoj kun bonaj kondiĉoj, kuracistoj faras periodan ekzamenadon kaj familian viziton al gravedaj virinoj; ili establas sankarton por la nove naskitaj infanoj, periode ekzamenas ilin, korektas ilian nenormalan kreskon kaj faras vakcinadon. Dank' al tio la mortokvanto de infanoj iom post iom malgrandiĝas. En iuj vilaĝoj la mortoprocentoj de infanoj malkreskis de 20% antaŭ la Liberiĝo ĝis 2.5% nun, kaj tetano grave minacanta la novnaskitojn estas fundamente likvidita.

Nova metodo por eduki kaj klerigi infanojn estas atentata en Ĉinio. En la pasinteco plejparto de la antaŭlernojaraj infanoj estis zorgataj de aĝuloj en la familio. Nun ni fondis diversspecajn infanvartejojn kaj infanĝardenojn, kiuj ludas efikan rolon en sanprotektado, klerigado kaj moraligado de la infanoj.

Rap.: Kiel progresas la infanvarta afero de nia lando? Ĉu la infanvartejoj kaj infanĝardenoj en la urboj kaj vilaĝoj povas kontentigi la bezonon?

Zhang: En urboj la registaro kaj edukaj institucioj fondis nombron da infanvartejoj kaj infanĝardenoj por eksperimentado kaj ekzemplodono. La plejmulto de la infanĝardenoj estas fonditaj de fabrikoj, entreprenoj, institucioj, lernejoj kaj loĝkvartaloj. Ekzemple, en la urbo Changzhou troviĝas 406 infanvartejoj kaj infanĝardenoj kun 21,086 vartataj infanoj. Ili fundamente kontentige plenumas la bezonon de la urbo. En la kamparo, laŭ produkta sezono oni



Vartistino instruas al infanoj sciojn pri protektado de la dentoj.

fondis diversformajn simplajn vartejojn tutjarajn kaj sezonajn, kaj infanajn lernogrupojn dependajn al lernejoj. Ĉu en la urbo aŭ en la kamparo, la vartejoj plejparte funkcias laŭ la deĵora tempo de la patrinoj. Iuj infanoj ricevas tagan vartadon kaj aliaj tagnoktan. Tiuj vartejoj kaj infanĝardenoj ne nur garantias sekurecon kaj sanan kreskon de la infanoj, sed ankaŭ ebligas al la patrinoj senzorge fari sian laboron, tial ili estas bonvenaj por la patrinoj. Sed nun, la disvolviĝo de la infana varta afero en la tuta lando ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon, kaj ni prenos paŝojn por daŭre disvolvi kaj altigi la nivelon.

Rap.: Kiujn sukcesojn oni atingis en preventado, kuracado kaj esplorado de infanaj malsanoj?

Zhang: Por tio multon faris pediatroj kaj porinfanaj sanprotektaj organizoj de nia lando. Ili aktive enketadis kaj esploradis la kreskadon, nutradon kaj malsanojn de la infanoj kaj la kaŭzojn kaj pocentojn de morto, kio metis bazon por preventi, kuraci kaj esplori malsanojn de infanoj. Ĉar oni efektivigas la principon preni preventadon kiel la ĉefan rimedon kontraŭ malsanoj, la akutaj infektaj malsanoj grave minacantaj la infanojn multe reduktiĝis en nia lando.

La nivelo de diagnozado kaj kuracado de oftaj kaj malfacile kuraceblaj malsanoj evidente altiĝis. Ni rikoltis bonajn fruktojn en kuracado de infanaj malsanoj per la ĉina kaj okcidenta medicino en kombino. Ekzemple, la kombina metodo por kuraci B-tipan encefaliton pli efikas ol la okcidenta, kaj dank' al tio evidente malpliiĝis la kvanto de morto kaj sekvaĵoj. Klinika praktiko pruvis, ke tiu metodo donis ankaŭ bonan efikon kaj malmultan malutilon en kuracado de virusa pulmito. La Beijing-a Pediatria Hospitalo aplikis tiun metodon por kuraci akutan apendiciton de infanoj kaj atingis la internacian nivelon per nur 12 mortintoj el 8,000 kazoj. Novaj teknikoj kaj metodoj estas aplikataj en diagnozo kaj kuracado de infanaj malsanoj. Ekzemple, Xinhua-hospitalo dependa de la Shanghai-a Dua Medicina Instituto projektis kaj faris koropulmo-maŝinon en kunlaboro kun aliaj unuoj kaj jam uzas ĝin en rektevida kora operacio kun eksterkorpa cirkulado.

Antaŭ nelonge la Ĉina Medicina Asocio okazigis la Sepan Tutlandan Pediatrian Simpozion. La kunveno ricevis pli ol 1,200 disertaĵojn kaj klinikajn raportojn pri infana sanprotekto, kuracado kaj preventado de infanaj malsanoj kaj fundamenta teorio. Tio estas granda kontribuo farita de niaj pediatroj en la infana sanprotekta laboro.

Rap.: Kia estas la sanostato de ĉinaj infanoj?

Zhang: Post la Liberiĝo la vivo de la vasta popolo boniĝis paŝon post paŝo, kaj samtempe senĉese leviĝis la nivelo de infana sano. La higiena fako de nia lando faris, en 1975, ekzamenadon al pli ol 270,000 infanoj de naŭ urboj kaj iliaj ĉirkaŭaĵoj. La enketado montris, ke ilia korpokvalito estas evidente altigita kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. La korpokvalito de infanoj de la ĉirkaŭurba kamparo jam atingis tiun de la urbo en la komenca periodo post la Liberiĝo. En 1963 kaj 1974 oni dufoje faris ekzamenadon al pli ol 189,000 infanoj de la aĝo de 7-14 jaroj en Guangdong-provinco. En komparado de samaĝuloj de la du jaroj la alteco de la knaboj meznombre kreskis je 3.3 cm., kaj tiu de la knabinoj je 2.7 cm.; la korpopezo de la knaboj kreskis je 1.6 kg., kaj tiu de la knabinoj je 1.3 kg.; la brusta perimetro de la knaboj plilongiĝis je 1.2 cm., kaj tiu de la knabinoj je 0.9 cm. Kun senĉesa disvolviĝo de la produktado kaj sanprotektado de Ĉinio la sana nivelo de niaj infanoj certe altiĝos plie.

Rap.: Mi opinias, ke la infana edukado estas grava problemo koncernanta ilian estontecon. Ĉu vi povas iom paroli pri tio?

Zhang: Tio estas vere grava problemo. En edukado al la infanoj ni ĉiam emfazas la kunagon de la lernejo, familio kaj socio. Tre gravan rolon ludas la edukado kaj influado fare de la gepatroj al la infanoj, tial instruistoj de lernejoj ofte faras viziton al la gepatroj. Kaj krome lernejoj kaj virinaj organizoj kune okazigas kunvenon de modelaj gepatroj por interŝanĝi sperton pri edukado, por ke ilia sperto estu disvastigata kaj ĉiuj gepatroj plenumu sian gloran devon eduki siajn gefilojn. La Ĉinaj Junpioniroj varbas progresemajn geknabojn de la aĝo 7-14 jaroj kiel siajn membrojn. La organizo aranĝas por ili interesajn postlernajn aktivadojn kulturan, literaturan, artan kaj sciencan, ekskursojn, tendumadon, fiziklaboron kaj servojn utilajn al la socio. En urboj kaj iuj vilaĝoj kun bonaj kondiĉoj fondiĝis geknabaj domoj, geknabaj domoj de scienco kaj tekniko, bibliotekoj, amatoraj sportaj lernejoj kaj aliaj eksterlernejaj edukaj organizoj. Laborantinoj de loĝkvartalaj komitatoj starigis simplajn helpstaciojn el mastrinoj kaj emeritoj por helpi la infanojn plenumi hejmtaskojn kaj disvolvi artajn kaj sportajn aktivadojn. Ĉiuj tiuj aktivadoj utilas al bona posedo de iliaj lernitaj scioj, plivastigo de ilia vidkampo kaj disvolvo de iliaj ŝatoj kaj talentoj. En la jaro 1978 okazis la Kvara Tutlanda Virina Kongreso, kiu difinis interalie zorgan kulturadon kaj edukadon de infanoj kiel gravan taskon de la ĉinaj virinoj en la nova periodo. „Tio ricevis varman subtenon de la ĉeestantaj reprezentantoj.



Ludo per tobogano

Pentristo Tang Yun lernigas al infanoj pentradon.

Rap.: Kion faris la ŝtato por la bonstatigo de la infanoj?

Zhang: Niaj partio kaj registaro metis grandan atenton sur tion kaj aplikis multajn rimedojn por disvolvi la bonstatigan aferon.

Ĉiujare la registaro elspezas konsiderindan sumon de mono por fari senpagajn vakcinan kaj malsanpreventan injektadon kaj liveri medikamentojn kontraŭ epidemioj. Krom pediatriaj hospitaloj, multaj ordinaraj kaj specialaj hospitaloj ĝenerale fondis pediatrian sekcion kaj pliigis malsanlitojn por infanoj. Duono de la elspezo de laboristoj kaj oficistoj de minejoj kaj fabrikoj por kuraci siajn infanojn estas pagita de la ŝtato.

Specialaj terenoj por geknaboj estas aldonitaj al kulturaj domoj, amuzejoj kaj ekskursejoj; teatroj kaj kinejoj faras specialajn prezentadojn por infanoj. La geknabaj domoj senpage akceptas infanojn, faras literaturajn kaj artajn prezentadojn kaj okazigas sciencajn-teknikajn kaj pentrartajn ekspoziciojn. Iuj urboj fondis specialajn kinejojn, teatron kaj parkon por infanoj. La Beijing-a Infana Arta Teatro faris 259 prezentadojn por ĉ. 400,000 spektantoj en unu sola jaro 1977.

La orfoj kaj kriplaj infanoj ricevas apartan zorgon de la registaro kaj socio. Ili ne nur havas garantiatan vivon, sed ankaŭ ricevas bonan edukadon. Post la Liberiĝo plimultiĝis ankaŭ la lernejoj por surdaj mutuloj kaj blinduloj. En 1976 miloj da infanoj de Tangshan perdis siajn gepatrojn en tertremo, tamen nun ili sane kreskas. Tio estis neimagebla en la malnova socio.

Rap.: Kian planon havas la koncerna fako de nia lando por la infana jaro?

Zhang: En 1979 ni planas fari ĝeneralan korpan ekzamenadon al la infanoj sub la aĝo de 14 jaroj. La Ĉina Medicina Akademio starigis sekcion de infana nutrado kaj disvastigas novan metodon de nutrado de infanoj en la kamparo. La Ĉina Virina Federacio okazigos en la lasta duonjaro tutlandan laborkunvenon de vartistoj kaj infanaj instruistoj por resumi sperton kaj antaŭenpuŝi vartan aferon. Por interŝanĝi sperton de kunagado de lernejoj, familioj kaj socio en

Geknaboj en lernado

Ujguraj infanoj en klasĉambro

tiu flanko, la edukaj departementoj kaj virinaj organizoj de diversaj lokoj kune okazigos kunvenojn, kaj publikigos artikolojn per ĵurnaloj kaj radiodisaŭdigo. Ankaŭ la Ĉinaj Junpioniroj kaj eksterlernejaj edukaj organizoj aranĝos riĉajn kaj signifohavajn aktivadojn.

Por kontentigi postulojn de malsamaĝaj infanoj oni eldonos milojn da infanaj legaĵoj. Krome oni decidis eldoni albumojn de infanaj pentraĵoj, fari porinfanajn filmojn kaj okazigi semajnon de porinfanaj filmoj. La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisios poŝtmarkojn pri la Internacia Infana Jaro.

Unesko kaj aliaj organizoj okazigos internacian konkurson de infanaj pentraĵoj, kio multe interesas la ĉinajn infanojn kaj iliajn gepatrojn kaj instruistojn. Por ĝi oni elektis bonajn pentraĵojn en la tuta Ĉinio.

Rap.: Dankon pro viaj afablaj respondoj.

Zhang: Ni havas devon tion fari por niaj amikoj. Kompreneble, kvankam nia laboro atingis iujn sukcesojn, tamen ĝi disvolviĝas malekvilibre kaj ni ankoraŭ devas multe fari en la estonteco. Sed estas certe, ke kun la disvolviĝo de la socialisma moderniga konstruado de nia lando la infana bonstatiga kaj sanprotekta afero estos pliapaŝe bonigita kaj antaŭenpuŝita.

Je la fino, bonvolu transdoni niajn salutojn al la esperantistoj-amikoj kaj ni deziras, al ili kaj iliaj infanoj, sanon, ĝojon kaj feliĉon.

XIAO ZHEN:

Infanvartistino kun bebo

POR SANA KREŜKADO DE INFANOJ

LA infanĝardeno de la Tianjin-a Trikaĵa Fabriko lokiĝas en vasta korto kun unuetaĝaj domoj. Kiam mi vizitis ĝin, la infanoj estis gaje ludantaj. Iliaj ruĝaj rondaj vizaĝetoj estas tre amindaj.

I

Mi rigardis kiel la infanoj prenas tagmanĝon. Kantante ili laŭvice iris al la lavejo por purigi siajn manojn kaj poste iris al siaj tabloj por preni manĝon. Kiel kutime, kuiristinoj alportis la manĝaĵojn: viandan pladon, legoman pladon kaj supon. Vidante ke sur la legoma plado estas flava ovaĵo kaj al la vianda plado estas verŝita tomata suko, la infanoj ekridis kaj ĝoje manklakadis. Vidante ke la infanoj prenas la manĝaĵojn kun bona apetito, ankaŭ la kuiristinoj ekridis.

Por ke la infanoj havu fortan sanon, tiu infanĝardeno tre atentas pri iliaj nutraĵoj. Mi iris en la kuirejon kaj vidis sur nigra tabulo menuon por semajno. En la listo troviĝas diversaj pladoj de ovaĵo kun salikokoj, kokaĵo, fumaĵita fiŝo, fiŝbuletoj, raguo el viando kaj sojfaba kazeo k. s. Ĉiuj 18 manĝoj de la semajno estas malsamaj. La nutraĵisto Zhang Caizhi diris al mi, ke ĉiumatene li frue iris al legomvendejo por aĉeti freŝajn legomojn. Laŭ la grandeco kaj taŭgeco de la aĉetitaj fiŝoj kaj salikokoj, oni faris bongustajn kaj malkarajn manĝaĵojn. La unutagaj manĝaĵoj por ĉiu infano kostas nur 0.26 juanon.

Ĉiumonate, oni faras analizon pri la nutrajoj de la infanoj kaj faras necesan rearanĝon al la menuo laŭ difinitaj normoj de nutraĵoj. La infanoj ŝatas variadon de la manĝaĵoj, kaj la

kuiristinoj klopodas por ilin kontentigi. Ekzemple, ili povas fari pli ol dek variajn pladojn el viando, zorge kunmetas por ĉiu manĝo rizaĵon, panon, kaĉon, supon, dolĉaĵon, salaĵon, viandaĵon kaj legomon kaj klopodas por fari la manĝaĵojn plaĉajn en koloro, odoro kaj gusto. En vintro ili preparas grasan supon kaj malhelkolorajn pladojn, dum en somero negrasan supon kaj helkolorajn pladojn, kaj por malsanaj infanoj ili preparas speciale manĝaĵon facile digesteblan. Ili ĉiam prenas la infanĝardenon kiel sian hejmon kaj klopodas por certigi sanan kreskadon de la infanoj. Vidante ke la infanoj havas bonan apetiton dum manĝado, ili sentas koran ĝojon.

II

La infanĝardeno de tiu fabriko starigis bonan sanprotektan sistemon por la infanoj.

Kiam la infanoj estas akceptataj de la infanĝardeno, ili ricevas plenan fizikan ekzamenon. Kaj poste, tia ekzameno estas ripetata post ĉiu duonjaro. La sanprotektanto ĉiumatene kontrolas la sanstaton de la infanoj kaj ofte mezuras ilian temperaturon. Matene de lundo, kiam la infanoj venas de sia hejmo al la infanĝardeno, oni pririgardas, palpas kaj pridemandas ilin por koni ilian sanstaton.

Krome, la infanĝardeno ankaŭ regule mezuras la pezon kaj longecon de la korpo de la infanoj je fiksita dato. En ĉiu monato, oni pesas unufoje la infanojn de malpli ol 3 jaroj, kaj en ĉiu sezono oni faras analizon pri ilia sanstato. Aparta prizorgo, pli da nutraĵoj kaj taŭga korpoekzerco estas donataj al la infanoj, kies korpopezo ne kreskas.

Oni ankaŭ tre zorgas pri la higieno de la infanoj. Ili akiris bonan kutimon lavi la manojn antaŭ kaj post manĝado kaj gargari per salakvo post dormo. Termofontaj banejo kaj naĝejo estas konstruitaj por la infanoj. En somero, la infanoj ricevas sunbanadon kaj lernas naĝadon. La lavmaŝino kaj sekiga maŝino de la infanĝardeno kreis kondiĉon, ke la vestaĵoj, litaĵoj kaj urintukoj de la infanoj ĉiam estu puraj.

Por preventi malsanojn de infanoj, la manĝilaro de la infanoj estas desinfektita post ĉiu manĝo. Ĉiutage, oni ventumas la litĉambrojn kaj ŝprucigas desinfektaĵon al ili. Printempe la vetero estas ŝanĝiĝema, oni ĉiam zorgas, ke la infanoj portu konvenajn vestojn. En vintro, la infanoj ofte estas atakataj de okulaj malsanoj kaj buŝulcero. Por preventi tiajn malsanojn, la

Infanoj vespermanĝas.

infanoj ofte ricevas sukeran supon el karoto. En sezonoj kiam cirkulas gripo kaj disenterio aŭ minacas epidemio, oni ĝustatempe injektas preventan kuracilon al la infanoj. Se oni trovas, ke iu infano suferas epidemion, oni tuj loĝigas lin en apartan ĉambron por flegado. En la lastaj jaroj, ne aperis kazoj de la malsanoj okula inflamo, hepatito, disenterio, skarlatino, koklušo kaj B-tipa encefalito en la infanĝardeno.

La infanĝardeno ne nur zorgas pri la kreskado de la infanoj sub sia flegado, sed ankaŭ tre zorgas pri la sano de la nove naskitaj beboj de la laboristinoj en la fabriko. Duonmonaton post la naskiĝo de tiuj beboj, la estro kaj flegisto de la infanĝardeno vizitas ilian hejmon por ekzameni ilian sanstaton kaj doni konsilojn al la patrinoj pri flegado de la beboj. Dank' al tia laboro, la infanoj havas solidan sanon jam antaŭ eniro al la infanĝardeno. Ĉiuj tridek kelkaj infanoj akceptitaj de la infanĝardeno en la pasinta jaro estis tre sanaj kaj fizike normalaj.

En vintro de 1978, la infanĝardeno faris fizikan ekzamenon kaj analizon al la 230 infanoj kaj konstatis, ke 99% de ili plipeziĝis kaj pli ol 95% de ili superis la difinitan normon de korpopezo. En la pasinta jaro, neniu el la infanoj suferis gravan malsanon.

III

Dank' al zorga sanprotekta laboro de la infanĝardeno de la trikaĵa fabriko, ĉiuj infanoj en ĝi sane kreskadas.

Pro nekonvena nutrado fare de sia sensperta patrino, malgranda Cao Ying estis tro malalta kaj malgrasa, kiam ŝi eniris la infanĝardenon. Ŝi manĝis malmulte kaj ofte ploris nokte. Sperta vartistino Li Xiuzheng ĉiutage ŝin masaĝis kaj helpis ŝin fari gimnastikajn movojn por havigi al ŝi bonan apetiton kaj fortigi ŝian sanon. Post certa tempo de tia flegado, malgranda Cao Ying ne plu estas plorema, havas bonan apetiton kaj dormas dolĉe. Ĉiumonate ŝia korpo plipeziĝas je 6 uncoj. Ŝia patrino tre ĝojiĝis pro tio kaj skribis dankan leteron al la infanĝardeno kaj laŭdis ĝian laboron.

La infano Wang Qiang suferis dermatozon kaj pro tio fariĝis malpaciencema. Ĉiutage vartistinoj dufoje lin banas, dufoje ŝmiras al li ungventon kaj ŝanĝas liajn vestojn laŭbezone. Kiam li malkvietas pro sufero, ili distras lin per interesaj rakontoj. Nun la haŭtomalsano de Wang Qiang preskaŭ kuraciĝis. Iu knabineto nomata Liu Xinli suferis rakiton kaj post dujara zorga kuracado kaj flegado ŝi jam fariĝis vigla infano.

La vartistinoj de la infanĝardeno ne nur zorgas pri la sano de la infanoj, sed ankaŭ multe klopodas por ilin klerigi kaj fari ilin patriotaj, laboremaj kaj protektemaj al komunaj posedaĵoj. La gepatroj de la infanoj unuvoĉe laŭdas ilin, ke ili prizorgas la infanojn pli bone ol la gepatroj mem. En la lastaj tri jaroj, la infanĝardeno ofte ricevis leterojn kaj dazibaŭojn (opiniafiŝojn) laŭdantajn ĝian laboron.

En ludo de "Aglo Ĉasas Kokidojn"

LIU YING:

ESPERANTO EN RADIO PEKINO

ANTAŬ nelonge, ege min interesis la informo, ke la Centra Popola Radiostacio baldaŭ elsendos diverslandajn popolkantojn en Esperanto prezentitajn de svisa kantisto Olivier Tzaut. Kiam mi ŝaltis mian radioricevilon en la tempo de la elsendo, mi estis tuj ĉarmita de la eleganta melodio prezentita de la dolĉa klara kaj bela voĉo de Sinjoro Olivier Tzaut. Laŭdire, la sonbendo de la popolkantoj estas liverita de la Esperanto-sekcio de Radio Pekino. La gekamaradoj de la sekcio estas bone konataj de mi, mi do vizitis ilin.

Ni, kiel malnovaj amikoj, kompreneble tre ĝojis pro la renkontiĝo. Enirinte en ilian kabineton, mi vidis, ke iuj el ili tradukas artikolojn por la elsendo, aliaj skribas leterojn al aŭskultantoj kaj triaj laŭtlegas rakontojn pri Afanti, baldaŭ disaŭdigotajn al la mondo. Nia babilado nature koncentriĝis al la temo pri disaŭdigo. Mi esprimis mian admiron al la kantarto de Sinjoro Olivier Tzaut, kio ankaŭ ilin ĝojigis. Sekve ni refoje kune aprecis la kantojn prezentitajn de Sinjoro Olivier Tzaut, krom aliaj kantoj prezentitaj de fremdlandaj kantistoj en Esperanto kaj muzikaĵoj senditaj de aŭskultantoj.

Nia interparolo tuŝis ankaŭ aliajn flankojn de la Esperanta disaŭdigo kaj retrorigardis la iritan vojon. Tiu ĉi jam estas la 15-a jaro de la Espe-

Preparado de disaŭdigaj programoj



ranta disaŭdigo de Radio Pekino komencita en 1964. Nun en sabato kaj dimanĉo ĝi okazas duonhore respektive al Eŭropo, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio. Ĝi celas konigi al diverslandaj esperantistoj la staton kaj sukcesojn de la revolucio kaj konstruado de la nova Ĉinio, la vivon de la ĉina popolo, ĉinajn kulturon, arton kaj geografion, la vidpunktojn kaj starpunktojn de nia lando pri gravaj internaciaj problemoj kaj akceli la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj, por ke Esperanto fariĝu vera instrumento por paco kaj amikeco.

Ĉe la komenco, la gekamaradoj de la sekcio aĝis nur je iom pli ol 20 jaroj. Ili kreskis kun la disaŭdigo.

Li Yuping, kiu eklaboris en la sekcio frue dum preparado de la disaŭdigo, diris: La Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino estis komencita sub la subteno de Ĉefministro Zhou Enlai, Vicĉefministro Chen Yi kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo Hujucz, ankaŭ nia forpasinta veterano Kamarado Venlo Fon por ĝi diligente laboris. Rememorante pasintajn okazintaĵojn, Li Yuping diris, ke antaŭ la komenciĝo de la disaŭdigo nemalmultaj fremdlandaj amikoj postulis Radion Pekinon disaŭdigi Esperantajn programerojn. Iuj japanaj amikoj faris petskriban aktivadon por tio. Poste ili sendis al ni la nomliston de la subskribintoj. Multaj el ili nun estas fervoraj aŭskultantoj de niaj elsendoj.

En disaŭdigado

Kamaradoj de la sekcio diris al mi ke en la 18-a de decembro, 1964, la tago neforgesebla por ili kiel esperantistoj, kiam estis iranta la subskriba aktivado de japanaj amikoj, oficiale komenciĝis la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino. Post nelonge, ili ricevis entuziasmajn gratulajn leterojn de esperantistoj el multaj landoj de la mondo. Ekde tiam aŭskultantoj ĉiam donas grandan subtenon kaj kuraĝigon al ilia laboro. Ili tre ĝojas, ke ili povas fari laborojn per Esperanto por pliigi la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉinaj kaj alilandaj popolanoj kaj esperantistoj.

Kamaradino Xue Meixian, respondeca pri korespondado kun aŭskultantoj, diris emocie: "En la pasintaj pli ol dek jaroj, ni trovis, en korespondado kun kaj akcepto de fremdlandaj esperantistoj, multajn amikojn de dekoj da landoj. Iuj el ili estas niaj malnovaj aŭskultantoj, aliaj nove konataj. Per diversaj manieroj ili donis al ni subtenon kaj kuraĝigon. Iuj ofte raportis al ni la aŭdeblecon de la elsendoj kaj elmetis valorajn proponojn kaj sincerajn kritikojn pri la formo, enhavo kaj anoncado de la programo, aliaj sendis al ni diskojn, kasetojn, librojn kaj gazetojn."

Aparte menciindaj estas Sinjoro Muramacu Jukijoŝi de Japanio, Sinjoro B. Najbaro de Britio, Sinjoroj Ernst Hopfler kaj Kondor de okcidenta Germanio, Gesinjoroj Enizan de Francio, kaj Sinjoro Leopold Patek de Aŭstrio. Sinjoro Muramacu Jukijoŝi kaj Sinjoro B. Najbaro sendis al ili multe da kasetoj, libroj kaj gazetoj, kaj donis al ili grandan helpon. Usona amiko David sendis al ili diafilmojn pri usonaj pejzaĝoj. Siaflanke, la Esperanto-sekcio sendis al li laŭ lia peto surbendigitan programon por la de li aranĝita somera universitato.

Laŭ postuloj de la aŭskultantoj la sekcio disaŭdigis programerojn ŝatatajn de ili. Ili prezentis al mi leteron de Sinjoro Norbert Merkens de okcidenta Germanio. En la letero li skribis: "Estiĝis tre rava kaj kvazaŭ steldevena muziko pro kombino de atmosferaj sonoj kaj fluta melodio. De tempo al tempo tiuj du sonofontoj tiel intermiksiĝis ke oni havis impreson de 'ĉiela'

Post dejoro

muziko. Imagante longan distancon inter sendilo kaj mi iomete mi sentis skuetiĝon, certe ankaŭ pro tio, ke tiu muziko estis adresita al mi. Koran dankon!" Sinjoro Norbert iam skribis en sia letero, ke lin interesis ĉina bambua fluto. La sekcio aranĝis speciale por li muzikan programeron pri ĉina bambua fluto kaj flutajn solojn de flutisto Lu Chunling.

Ili ankaŭ intervidiĝis kun aŭskultantoj. Ili diris al mi pri la intervidiĝo kun Ingrid Plazotta, parolistino de la Esperanto-redakcio de Aŭstria Radiostacio en la pasinta jaro, pri tiuj gajaj tagoj pasigitaj kun la vizitgrupo de japanaj esperantistoj kun S-ro Tokuda Rokuro kiel la estro kaj Umeda Joŝimi kiel la ĝenerala sekretario, pri la intervidiĝo kun Sinjorino Yukiko Isobe, direktorino de la Japana Esperanto-Instituto kaj ankaŭ pri vizitoj fare de aliaj esperantistoj. Sinjoroj Tokuda Rokuro, Nagaoka Ĵiro kaj Harada Ikuo de la grupo elmetis valorajn opiniojn pri la disaŭdigo. La kamaradoj de la sekcio esprimis sian dankon al la samideanoj de la Esperanto-redakcio de Aŭstria Radiostacio pro tio, ke la lastaj prezentis al la sekcio siajn spertojn kaj programerojn. Ili donas altan atenton al tio, ĉar tio simbolas la profundan amikecon inter esperantistoj.

Fine, ili, plenaj je memfido, ĝoje sciigis al mi sian planon. Ili diris ankaŭ, ke por plibonigi la disaŭdigon ili devas multe klopodi, kaj ankaŭ bezonas daŭran helpon de la aŭskultantoj. Ili volonte akceptos proponojn de la aŭskultantoj pri deziratai programeroj.



Ma Hengchang (la dua de dekstre) kaj laboristoj de lia grupo en interkonsiliĝo pri teknologia renovigo

YANG BAOHE:

ILI MERITAS LA NOMON DE MODELO

EN la urbo Qiqihar de norda Ĉinio sin trovas la Qiqihar-a Dua Ilmaŝina Fabriko, kiu produktas ĉefe aŭtomatajn fridajn pregmaŝinojn. Enirinte en la laborejon de mezgrandaj partoj de forĝaj premiloj oni povas vidi, ke laboristoj absorbite laboras ĉe brile purigitaj maŝinoj. Sur la muro de la laborejo pendas multaj honoraj flagoj kaj diplomoj, inter kiuj la plej nova kaj plej granda flago "Heroa Kolektivo" estis donita de la Tutlanda Maŝinindustria Kunveno al la Grupo de Ma Hengchang de tiu laborejo pro ĝia elstara atingo en la produktado, en aŭgusto de 1978.

Ma Hengchang-grupo, fame konata tra la tuta Ĉinio, fondiĝis en 1949. Antaŭ 30 jaroj ĝi akiris la unuan cirkulantan ruĝan flagon en laborkonkurso. Ĉirkaŭante la ruĝan flagon la laboristoj tiam emocie diris: "Ni nepre firme tenos la flagon en nia grupo." En la postaj jaroj ili efektivigis sian promeson en la praktikado. La honoraj flagoj kaj diplomoj ja estas registro pri ĝia gloro en ĉiuj periodoj.

EN LA PASINTAJ 30 JAROJ

En 1949 la fabriko, en kiu laboris Ma Hengchang-grupo, ankoraŭ estis en la jus liberigita Shenyang (Ŝenjang). Tiam mankis al la fabriko materialoj kaj instrumentoj, kaj malamikaj aviadiloj de tempo al tempo alflugis por bombadi. Por subteni la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon en liberigo de la tuta Ĉinio per pliprodukto de armiloj, la dek laboristoj de la grupo kun Ma Hengchang kiel la estro iniciatis laborkonkurson kun pli ol 70 skipoj de la tuta fabriko, kaj tio

akcelis la produktadon de la fabriko. En la laborkonkurso la grupo akiris la unuan cirkulantan ruĝan flagon kaj estis titolita per la nomo de Ma Hengchang. Pro ĝia avangarda rolo en la ekonomia fronto de la tuta lando ĝi estis ankaŭ nomita Tutlanda Modela Grupo de Laboro en 1950.

En la dua jaro post la fondiĝo de la nova Ĉinio eksplodis la Kontraŭusona Milito por Helpi Koreion. La fabriko translokiĝis de Shenyang al Qiqihar. Tiam la fabriko distancis je pli ol 5 kilometroj fore de la fervoja stacio, kaj mankis al ĝi kamionoj por transporti la maŝinojn. Sub la stimulo de bona ekzemplo donita de Ma Hengchang-grupo oni portis homforte la maŝinojn al la fabriko en frosto de kelkdek gradoj sub la nulo. Post trimonata preparado la fabriko oficiale komencis produktadon. En la periodo de la Kontraŭusona Milito por Helpi Koreion, la grupo iniciatis patriotisman laborkonkurson al ĉiuj skipoj de la industria fronto de la tuta lando, en kiu partoprenis pli ol 18,000 skipoj. Dank' al tio formiĝis produkta tajdo en la industria fronto. De tiam la grupo ĉiam konservas altan entuziasmon kaj progresadas en produktado. Eĉ en 1976 ili bone plenumis la produktan planon malgraŭ serioza ĝenado de la "kvarpersona bando". En tiu jaro ili superplenumis la jaran produktan planon je 113 tagoj antaŭ la fiksita dato kaj 99.6% de ĝiaj produktaĵoj estis normaj en kvalito.

En la pasintaj 30 jaroj, la grupo ĉiujare meznombre plenumis laborkvanton egalan al tiu de unu kaj duona jaro. Ĝiaj membroj diligente lernis kaj aplikis avangardajn spertojn, kaj iliaj normaj produktaĵoj ĉiam superas pli ol 99.4%. Ĝi ankaŭ kulturis 280 kvalifikitajn laboristojn, 43 el kiuj estis promociitaj kiel diversnivelaj gvidantoj. Nun la 71-jara Ma Hengchang estas ĉefmaŝinisto de la fabriko, kaj Dong Zhenyuan, kiu estis metilernanto de la grupo en 1949, nun funkcias kiel estro de la fabriko.

"SEKRETO"

"Ĉu estas ia sekreto, kiu ebligis al la grupo longtempe konservi sian honoran pozicion pro kontinua progreso en produktado?" ofte demandis vizitantoj kun admiro. La respondo estas negativa. Tie tamen estas alta revolucia entuziasmo, lernemo pri tekniko kaj diligentaj manoj de la laboristoj.

Lastatempe la grupo havas postlaboran studrondon de junaj laboristoj. Ĝi fondiĝis subtenate de la fabrika aŭtoritato. En la studrondo oni ĉefe lernas matematikon, fremdan lingvon kaj teknikan teorion. Laŭ ilia plano, la klereco de 30% de la grupanoj atingos la nivelon de diplomitoj de altaj lernejoj kaj tiu de la aliaj 70% atingos la nivelon de mezgradaj kolegioj en 1982.

Diligenta studo de scienco kaj tekniko kaj teknika renovigado estas bona tradicio de Ma Hengchang-grupo. Komence de 1949, kiam la maljuna grupestro Ma faris la unuan renovigon pri instrumento, neniam interrompiĝis la teknika studado kaj teknika renovigo de la grupo. En la pasintaj 30 jaroj, ĝi plenumis sume pli ol 840 teknikajn renovigojn, kiuj ludis grandan rolon por altigi laborproduktivon, garantii kvaliton de produktaĵoj kaj ŝpari materialojn.

Nun en la fabriko ankoraŭ cirkulas rakonto pri teknika renovigado fare de Zhang Jinting. En 1960 la kvalito de iuj produktaĵoj de la grupo iutempe ne povis atingi la normon postulatan

Ekzamenado de kvalito de produktaĵoj



de la ŝtato kaj pro tio necesis renovigi ilmaŝinojn. Tage Zhang Jinting observis funkciadon de la ilmaŝino kaj vespere faris projektan skizon. Iun vesperon, kiam li cerbumadis ĉe la tablo, tiktakado de la vekhorloĝo subite pensigis lin pri simileco de la mekanismo de la horloĝo kun tiu de la ilmaŝino. Li malmuntis la horloĝon por esploro. Post kiam lia nova projekta skizo estis plenumita, la horloĝo jam estis dispartigita. La ilmaŝinoj reformitaj de Zhang Jinting altigis la produktivon kaj produktaĵan kvaliton. De 1955 ĝis 1964 li sukcesis fari pli ol 70 teknikajn renovigojn kaj pro tio fariĝis modelo en tiu flanko.

Kun disvolviĝo de la produktado senĉese noviĝis la membraro de la grupo. La novaj laboristoj havas altan entuziasmon kaj multan energion, sed malaltan teknikan nivelon kaj malmultan sperton. Por kiel eble plej rapide altigi ilian teknikan nivelon, la laboristoj de la grupo kun alta teknika nivelo ofte faras al ili teknikan demonstradon. Krome la grupo aranĝis ke ili faru teknikan esploradon kaj lernu teknikan teorion kaj bazajn sciojn pri prilaborado per ilmaŝinoj. Ĝi faras ekzamenon en difinita tempo pri teknikaj teorio kaj praktikado kaj ellaboras planon por plua studo de tekniko laŭ la ekzamena rezulto.

Dank' al tio la grupanoj rapide altigis sian teknikan nivelon kaj ofte prezentis raciajn proponojn. Antaŭe unu skipo povis torni en unu deĵoro nur 30 ĉefajn aksojn, sed nun jam 66.

Sur la muro de la grupo pendas pluraj vitritaj kadroj, en kiuj estas skribitaj sistemo de persona responso de produkta grupo, regularoj pri administrado de la grupo kaj la respondeco de laboristoj, skipestroj kaj administranto. Tiuj regularoj ne estas elpensitaj de iu ajn, nek ellaboritaj en mallonga tempo, ili estas starigitaj laŭ postuloj de la produktado kaj senĉese perfektiĝis en la praktikado. Dank' al ili la produktado de la grupo iras en bona ordo.

Por garantii plenumon de tiuj regularoj, la grupo starigis grupestron, kontroliston de teknika kvalito, ekonomian kalkuliston, ekipaĵosekuriston kaj vivo-zorganton. Tio multe levis la devokonscion de la laboristoj, kaj ĉiuj zorgas la grupon kaj unuanime plenumas ĝiajn taskojn.

VARMA GRANDA FAMILIO

La grupo havas notlibron, en kies unua parto la vivo-zorganto registris familian vivstaton de ĉiuj grupanoj, kiel ekzemple nombron de iliaj familianoj, adreson kaj enspezon, kaj en la dua parto li notis la laborplanon de ĉiu monato kaj "memorandon". Ekzemple, sur unu paĝo li rimarkigis la grupanojn, ke iu el ili eksuferis enteriton pro neglekto, kaj atentigis ilin pri sia sano. En tio montriĝas la bona rilato inter la grupanoj.

La grupanoj ne nur helpas unu alian en politiko, tekniko kaj studo, sed ankaŭ disvolvas inter si klasan amikecon en la vivo. La 25-jara vivo-zorganto Qi Zuoyong estas solfilo, li tre malmulte zorgas dommastrumadon hejme. Sed li tre bone zorgas pri la grupanoj. Foje iu kamarado de la grupo veturis alilokon pro laboro. Dum lia foresto, Qi Zuoyong kaj kelkaj grupanoj plurfoje vizitis lian edzinon por ŝin iel helpi. Kiam li trovis, ke malmulte da hejtaĵo restas al la familio, li tuj helpis ŝin aĉeti karbon.

Frue en la kvindekaj jaroj, la vivo-zorganto de la grupo rimarkis dum sia vizitado al familioj de grupanoj, ke iuj laboristoj ne volas paroli en la grupo pri siaj malfaciloj en la vivo, sekve formiĝis la sistemo de vizitado al la familioj de la grupanoj.

Foje iu juna laboristo subite fariĝis malserena dum kelkaj tagoj. Kio okazis al li? Post interparolo kun li kaj vizitado al lia hejmo oni trovis, ke li kveleris kun sia edzino pro malharmonio inter liaj edzino kaj patrino. En tiuj tagoj lia edzino lasis sian 8-monatan infaneton hejme kaj sola iris al sia patrino. Laboristoj de la grupo plurfoje vizitis lian hejmon kaj helpis lin restarigi familian harmonion.

Ĉiufoje, kiam la grupo estis ŝarĝita per peza tasko, la vivozorganto faris ĝeneralan viziton al la hejmoj de la grupanoj por helpi ilin en la vivo. Dank' al tio la laboristoj povas senzorge sin ĵeti en la laboron kaj akiri subtenon de sia familio. Junaj laboristoj, kiuj ĵus venis al la grupo, komence sentis ke la postuloj de la grupo al ili estas tro rigoraj, tamen post iom da tempo ili sentas, ke ili vivas kvazaŭ en varma granda familio.

HUA WEN:

FORSTOKULTURA TEKNIKISTO

HUANG Genpin naskiĝis en famkonata turisma urbo Hangzhou (Hangĝoŭ) kun la pitoreska Okcidenta Lago. En marto de 1956, kiel forstokultura teknikisto li venis al Yan'an (Jan-an), urbo kun revolucia tradicio, por ĉeesti la Forstokulturan Konferencon de Junuloj de Kvin Provincoj. Kiam li ascendis Pagodo-monton kaj ĵetis rigardon malproksimen, la ĉirkaŭaj kalvaj montoj saltis en liajn okulojn.

Vidinte tion, la 23-jara Huang Genpin tre emociiĝis kaj decidis ŝanĝi la postiĝintan fizionomion kune kun la yan'an-a popolo. Li pensis en si: Kvankam tie la kondiĉoj estas pli malfacilaj ol en lia hejmloko, tamen la loko bezonas junulojn kiel li kaj ili devas konstrui ĝin tiel bela kiel la Okcidenta Lago.

Huang Genpin prezentis al la konferenco petskribon por labori en Yan'an. Li ricevis sankcion kaj estis instalita en la forstokultura stacio.

Huang Genpin unue vizitis Shen Changlin, superklasan labormodelon de la Shaanxi-Gansu-Ningxia-a (Ŝenhi-Gansu-Ninghia-a) Limregiono. Por lerni de Shen, li ĉiam vivis kaj laboris kun li. La modelo ofte rakontis al li historiojn pri revolucia batalo de la yan'an-a popolo, konigis al li la klimatan ŝanĝon kaj naturan leĝon kaj kuraĝigis lin fari multan kontribuon por konstrui Yan'an. Huang ankaŭ ofte konsultis kamparanon-ĝardeniston Li Xin'an pri tekniko.

Por ke Yan'an surmetu al si verdan veston, Huang Genpin decidis fikse loĝi en Yan'an. Tie li edziĝis al iu loka knabino kaj nun ili jam havas gefilojn.

En 1956, kiam li forlasis Hangzhou, junuloj ĉe la Okcidenta Lago proponis al li transplanti metasekvojojn kaj aliajn valorajn arbojn al Yan'an. Kiam li komencis planti ilin ĉe Yan'an, iu kapskuante diris, ke metasekvojoj kreskas nur en iuj lokoj de suda Ĉinio, kaj en aliaj lokoj troviĝas nur metasekvojaj fosilioj. Sed li ne deprimiĝis pro tio. En la komenco li plantis pli ol 30 metasekvojojn en loko kun fekunda grundo, sufiĉaj sunradioj kaj aero. Poste li akurate ilin sterkis per varma sterkaĵo kaj akvumis; en vintro, li envolvis ĉirkaŭ iliajn trunkojn per pajlo kontraŭ frosto En la sekvinta printempo, oni

Huang Genpin

ĝoje vidis, ke pli ol dek kelkaj metasekvojoj donis helverdajn foliojn. Nun ili jam fariĝis arbegoj. En 1972, Shaanxi-provinco okazigis en Yan'an kunvenon por disvastigi la sperton de Huang Genpin en transplantado de metasekvojoj, kaj en multaj lokoj de la provinco nun kreskas tiaj arboj.

Por bari sabloventon, Huang Genpin ĉiamaniere provplantis en la regiono Yan'an alilokajn pinojn kaj cipresojn. Iufoje li elektis 33 plantidojn de olea pino *(Pinus tabulaeformis)* en iu forstokulturejo. Por ne frostigi kaj kontuzi iliajn radikojn, li zorge envolvis la radikojn, kaj iufoje li eĉ demetis sian veston por ĉirkaŭvolvi plantidojn. 32 el la arbidoj sekure trapasis frostan vintron kaj en somero de la sekvinta jaro jam surhavis belan oleverdan veston. Poste li publikigis artikolon pri tiu sperto en "Informoj pri Forstokultura Scienco kaj Tekniko" eldonata de la Ĉina Scienca Akademio de Agrikulturo kaj Forstokulturo. En la lastaj jaroj, en printempo aŭ aŭtuno, Huang ĉiam persone ascendas la montojn por esplori kaj fari novan planon pri plantado de arboj. Krom eksperimentado kaj memstudado, li plurfoje okazigis kurson por kulturi teknikistojn.

Huang Genpin kaj vizitantoj en interŝanĝo de sperto

Hodiaŭ multaj montoj de Yan'an jam estas verdigitaj. La forstigita areo en la antaŭurbo de Yan'an jam atingis 2,000 hektarojn. Nun tie kreskas pli ol 100,000 oleaj pinoj, malofte videblaj en la urbo antaŭ 1956. Cedroj, piceoj, ginkoj kaj aliaj arboj transplantitaj el aliaj lokoj ĉiuj sane kreskas tie. La ŝanĝiĝo de Yan'an estas nedisigebla de la diligenta laboro de Huang Genpin.

Korespondi Deziras

* Dez. kor. kun mezaĝaj virinoj pri artismo, azia filozofio, arta sperto (joga, kc.). Respondo garantiata. S-ro Tomo Plačkovic, p. Kesto 90, 52001 Pula, Jugoslavio.

* S-ro Ronald C. Peries, Molesworth Gastejo, Glenfalls Road, Nuwara Eliyao, Sri Lanka, kun ĉinaj esp-istoj.

* Mieczyslaw Wilusz, ul. Zjednoczenia 121, 33-340 Stary Sacz, Pollando. kun ĉl. esp-istoj pri lingvistiko k interŝ. bk k pm.

* Andrea Abdic, M. Tita 39, YU-43000 Bjelovar, Jugoslavio, 13-j. lernantino, kun samaĝuloj el ĉl.

* S-ano Ladislav Johl, str. Caragiale nr. 5/21, 4800 Baia Mare, Rumanio, kun ĉinaj esp-istoj pri kuracplantoj k fungo-kolektado krom pm-kolektado.

* S-ro Sakurai Narimasa, 4-11-13 Nakakaigan, Chigasaki-shi, Kanagawa, Japanio, 26-j. asistanto de universitato, kun ĉinaj esp-istoj.

* Branka Spasojevič, 58000 Split. Pajičeva 18, Jugoslavio, 19-j. studentino, kun samaĝaj gejunuloj ĉinaj k alilandaj.

* Leszek Putynski, ul. Powstancow W-wy 3/14, 98-200 Sieradz, Pollando, 21-j. studento de ekonomio, kun ĉinaj esp-istoj.

Belaj Sonoj el la Koro

IUN printempan vesperon de la kuranta jaro, en la Ĉefurba Sporthalo de Beijing (Pekino) 18,000 aŭskultantoj estis absorbitaj de la belaj kaj orelplaĉaj muzikaĵoj kune prezentitaj de la Bostona Simfonia Orkestro kaj la Centra Filharmonio de Ĉinio sub la direktado de la mondfama direktisto Seiĝi Ozava.

Tiu koncerto komenciĝis per violona konĉerto en E minora de la germana komponisto F. Mendelssohn, ludita de la usona fama violonisto Joseph Silverstein en akompano de la Centra Filharmonio, kaj ĝian kulminon formis "La Kvina Simfonio" de Betoveno, kune ludita de 217 muzikistoj de la Bostona Simfonia Orkestro kaj la Centra Filharmonio de Ĉinio. Apenaŭ finiĝis la prezentado, eksplodis en la halo tondraj aplaŭdoj. Seiĝi Ozava ronde kuretis tra la halo por saluti la aklamantajn aŭskultantojn. Direktisto de la Centra Filharmonio Han Zhongjie emocie diris: "Tia grandioza kunludado estas malofta en la mondo. Ĝi estas amika kunlaboro kaj arta interŝanĝo kaj ankaŭ ŝanco por ni lerni de la amikoj en la arto. Ĝi utilas al plifortigo de la amikeco inter la popoloj kaj muzikistoj de Ĉinio kaj Usono." Iu studento de la Centra Konservatorio diris: "Kvankam mi ne komprenas la lingvon de la usonaj muzikistoj, tamen mi komprenas la muzikan lingvon. La amikeco inter la du landoj enteksiĝis en la ludadon."

Seiĝi Ozava en direktado de la Ĉina Centra Filharmonio

Seiĝi Ozava

La Bostona Simfonia Orkestro estis la unua usona arta grupo, kiu vizitis nian landon kiel delegito de kultura interŝanĝo post la establo de diplomatiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Usono. Dum la unu-semajna vizitado al Ĉinio, ĝi faris kvar prezentojn en Shanghai kaj Beijing kaj ricevis varman aplaŭdon de la aŭskultantoj. Tiu mondfama orkestro kun historio de preskaŭ cent jaroj prezentis, por la ĉinaj aŭskultantoj, germanajn klasikajn muzikaĵojn, francajn impresionismajn komponaĵojn, rusajn profundajn muzikaĵojn kaj ankaŭ usonajn kaj ĉinajn modernajn verkojn. En la prezentado la usona orkestro bone montris la proprajn stilojn kaj epokajn karakterizaĵojn de tiuj verkoj. Precipe laŭdinda estis la perfekta harmonio inter la ludantoj kaj la kunlaboro de tiuj kun la direktisto. S-ro Seiĝi Ozava montris altan nivelon en direkta arto. Li profunde komprenas la verkojn kaj lerte kaj dece esprimis la malsamajn sentimentojn kaj karakterizaĵojn de malsamaj verkoj per sia direktado. Lia direkta lingvo estas klara kaj riĉa, kaj liaj manoj lertaj en esprimo de patoso kaj poezio, liaj vizaĝesprimoj plenaj de artaj imagoj kaj la ritmaj moviĝoj de lia korpo ĉiuj senescepte inspiris al la tuta orkestro grandan kreemon. Laŭ la bezono de la enhavo de verko li montris sin jen viglamova kaj forta kiel leono, jen milda kiel akvo en printempa zefiro. Ĝuste sub lia direktado la muzikistoj plenkore sin ĵetis en la kune kreitan artan medion kaj eligis belajn sonojn el la koro, kiuj donis fortan efekton al la aŭskultantoj.

Ĉifoja vizitado de Seiĝi Ozava al Ĉinio estas lia dua vizitado al sia naskiĝlando. Li diris: "Mi estas japano kaj japano naskiĝinta en Ĉinio, kaj krome mi reprezentas eŭropan muzikon." Li opinias, ke kombinado de muzikoj orienta kaj okcidenta, same kiel kombinado de muzikoj klasika kaj moderna, estas lia devo. Tial, kiam li unuafoje aŭskultis la ĉinan bivan konĉerton "Fratinetoj sur la Stepo" prezentitan de la Centra Filharmonio dum lia unuafoja reveno al Ĉinio en 1976, li opiniis, ke tiu verko estas bona komenco de kombino de la orienta kaj okcidenta muzikoj. Post reveno al Usono li serioze studis tiun verkon donacitan de la Centra Filharmonio al li. Li klopodis por kompreni la enhavon de la verko kaj mastri la stilon de la ĉina nacia muziko. Ĉifoje li direktis la Bostonan Simfonian Orkestron en ludado de tiu verko, en kiu solon ludis la ĉina bivisto Liu Dehai. Sub lia direktado ĉiuj ludantoj klopodis plenatente por esprimi la sentimenton de la ĉina popolo per la ne bone

konataj melodioj. Inter la programeroj luditaj de la orkestro en Beijing sin trovis la unua piana koncerto en E maĵora de F. Liszt kaj la dua suito de "Daphnis kaj Chloe" de Ravel, kies solon ludis la ĉina fortepianisto Liu Shikun en akompano de la Bostona Simfonia Orkestro.

Dum la restado de la Bostona Simfonia Orkestro en Ĉinio, Seiĝi Ozava estis la plej okupata. Krom ĉiutaga provludado kaj prezentado li ankaŭ donis lekcion al studentoj de la direkta fakultato de la Centra Konservatorio. Tie li rigardis provludadon de simfonio "La Nefinita" de Schubert fare de la Orkestro de Junaj Pioniroj de la dependa mezlernejo de la Centra Konservatorio sub direktado de iu studento. Komence li atente aŭskultis inter la spektantoj, post iom da tempo li iris sur la scenejon kaj kaŭriĝis antaŭ la direktisto por observi liajn movojn. Li trovis, ke tiu studento ne bone esprimis la enhavon de la verko kaj mankis al li muzika sentimento. Li do pacience inspiris al li ĝuste esprimi la enhavon de ĉiu muzika frazo. Li aparte emfazis, ke direktisto devas atente aŭskulti, inspiri per sentoj, sed ne klopodi nur por beleco de gestoj. Li foje kaj refoje faris demonstradon, kio multe edifis la instruistojn kaj studentojn.

Sinjoro Seiĝi Ozava havas profundan amikecon por la ĉina popolo. Lia zorgo al la ĉina muzika afero montriĝis ankaŭ en tio, ke li tre atentis pri trovo de talentuloj. En Shanghai li trovis talentajn violoncĉeliston kaj violoniston. Li ankaŭ decidis kulturi por la Centra Filharmonio junan direktiston kaj donacis multajn valorajn muzikajn literaturojn kaj instrumentojn al la ĉinaj kolegoj. La ĉina popolo neniam forgesos lian amikecon. Kvankam la Bostona Simfonia Orkestro faris en Ĉinio nur kvar prezentojn, tamen la nombro de la rektaj aŭskultantoj atingis pli ol 24,000 kaj ankoraŭ pli multaj aŭskultantoj ĝuis ĝian eminentan arton pere de radiodisaŭdigo kaj televido.



Membroj de la Bostona Simfonia Orkestro kaj la unua violonisto de la Centra Filharmonio de Ĉinio en interŝanĝo de sperto

Seiĝi Ozava kun la Orkestro de Junaj Pioniroj

La vizitado de la Bostona Simfonia Orkestro efektivigis la deziron de Seiĝi Ozava ebligi al la ĉina kaj usona popoloj interparoli per muziko kaj plifortigis la amikecon inter la popoloj kaj muzikistoj de ambaŭ landoj.

FAN LI:

Fremdlandaj Amikoj Lernas Tajĝiĉjuan

EN ĉiu mateno, ĉe la *tajĝiĉjuan*-instruaj stacioj dislokitaj en Beijing (Pekino), multaj okupiĝas pri tiu gimnastika ekzerco, kaj fremdlandaj amikoj estas altiritaj al la lernado.

Tajĝiĉjuan estas unu el la tradiciaj ĉinaj sportoj. Ĝi gajnas ŝaton de pli kaj pli multaj alilandaj amikoj en Beijing.

Iun matenon en la lasta oktobro, Vicĉefministro Julius Chan de Papua Nov-Gvineo, vizitanta nian landon, promenis de la hotelo al la *tajĝiĉjuan*-instrua stacio ĉe Ganjiakou en Beijing. Kun granda intereso li spektis la ekzercadon de la popolamaso kaj demandis pri la aboco de *tajĝiĉjuan*. Ekde 1978 pli ol 360 gastoj el tri japanaj amikecaj delegacioj, la Delegacio de la Usona-Ĉina Amikeca Asocio, la Brita Amikeca Vizitgrupo k.a. lernis *tajĝiĉjuan* ĉe *tajĝiĉjuan*-instruaj stacioj proksimaj de iliaj hoteloj. Laŭ ilia peto iuj kvartalaj fizikkulturaj kaj sportaj komisionoj sendis bonajn instruistojn por ilin helpi. La amikoj lernis serioze. Ili registris la instruadon de *tajĝiĉjuan* kaj la skermarto *tajĝiĝjan* samstila kiel *tajĝiĉjuan* per vidbendoj kaj sonbendoj kaj multe fotografis pri tio. Reveninte en siajn landojn, multaj el ili alsendis fotojn kaj leterojn por esprimi siajn dankojn. Iu japana amiko skribis: "Vi senlace instruis al mi la 88-movan *tajĝiĉjuan*. Mi ellernis ne nur la gimnastikan arton, sed ankaŭ vian spiriton de servo al la popolo."

Multe da fremdlandaj amikoj frekventas la *tajĝiĉjuan*-instruan stacion apud la Kultura Palaco de la Naciecoj ĉe la viglecplena okcidenta Chang-an-strato. Por helpi ilin en la lernado la Okcident-kvartala Fizikkultura kaj Sporta Komisiono kaj aliaj koncernaj institucioj komi-

Tajĝiĉjuan-kurso de fremdlandanoj

siis specilajn instruistojn kaj interpretistojn. La gastoj tre kontentas pri tio. Ankaŭ en aliaj lokoj, kiel ekzemple en la parkoj Ritan, Dongdan, Beihai kaj ĉe la lago Shishahai, la *tajĝiĉjuan*-instruaj stacioj akceptas aron post aro da diverslandaj *tajĝiĉjuan*-lernantoj.

En la vasta kaj hela tenisa halo de la Beijinga Internacia Klubo ofte vidiĝas fremdlandaj amikoj en kolorriĉaj vestoj, lernantaj *tajĝiĉjuan*. Tiuj "entuziasmuloj" imitas la movojn de la instruanto laŭ ties indikoj. Laŭ peto de personoj en diverslandaj ambasadoj en Ĉinio, la Internacia Klubo sesfoje funkciigis dumonatan *tajĝiĉjuan*-kurson de post la aŭtuno de 1976. La kurson vizitis proksimume 400 amikoj el 35 landoj de la kvin kontinentoj. Inter ili estas ambasadoroj, konsilantoj, aliaj diplomatoj, iliaj familianoj kaj ankaŭ fremdlandaj ĵurnalistoj en Beijing.

La *tajĝiĉjuan*-kursanoj en la Internacia Klubo trejnas sin konscience. Antaŭ la leciono iuj ekzercas sin laŭ bildoj, kaj post la leciono ili ankoraŭ ne volas foriri, dezirante lerni pli multe kaj pli bone. Sinjorino Burali de Italio diris: "La movoj de *tajĝiĉjuan* estas tre belaj. Mi sentas, ke ĝi tre utilas al la sano. Ĝi ne nur ekzercas la korpon, sed ankaŭ refreŝigas la cerbon. Precipe kiam mia kapo laciĝas aŭ mi koleras aŭ malĝojas, *tajĝiĉjuan* forgesigas al mi ĉion tion." Ĉiutage ŝi praktikas *tajĝiĉjuan* trifoje en la hejmo. Sinjoro Burali iam diris malpacience: "Sufiĉe, sufiĉe, ĉiam tio senfine!" Sed ŝi ankoraŭ daŭrigis sian ekzercon. La ataŝeo Bayramli de la turka ambasado estas fervora *tajĝiĉjuan*-amatoro. Li jam duafoje aliĝis al *tajĝiĉjuan*-kurso. Lastfoje, li estis malfeliĉe vundita pro kolizio de veturilo, poste li veturis al Xianggang (Hongkongo) por plenumi oficon, kaj tio interrompis lian lernadon. Li diris flue en la ĉina lingvo: "Mi jam pasigis tri jarojn en Ĉinio. Mi deziras multon lerni kaj alporti al mia patrujo." La jugoslava amiko R. Nikovski vizitis tri sinsekvajn *tajĝiĉjuan*-kursojn. Dum la lernado li elmetis al si rigoran postulon kaj persistis ĝisfine malgraŭ doloro de siaj kruroj. En la lasta septembro li finplenumis sian komision kaj devis reveni al sia lando. Antaŭ forveturo li filmis ĉiujn *tajĝiĉjuan*-movojn de la instruanto. Li diris: "Reveninte en la patrion, mi neniam forgesos *tajĝiĉjuan*. Se iuj movoj estos forgesitaj, mi projekcios la filmon kaj ekzercos min laŭ ĝi." La madagaskara ambasadoro Raktofiringa kaj la ataŝeino Bringger de la svisa ambasado modeste lernas kun respekto al la instruanto, diligente praktikis ĝin kaj progresis rapide. Ankoraŭ pli kortuŝa estas tio, ke iu franca kursano hazarde glitfalis aliloke kaj lezis sian kruron, sed li ankoraŭ vizitis la kurson kun paro da lambastonoj sub la brakoj por observi alies praktikadon, kvankam li mem ne povis ekzerci sin.

La kurso ofte vendis ilustritan libron pri *tajĝiĉjuan*, kaj tamen ĉiufoje la stoko rapide elĉerpiĝis kaj ne povis kontentigi la bezonojn de la amikoj. Iu brazila amiko aĉetis multe da ekzempleroj kaj diris: "Mi sendos ilin al Brazilo,

Respondeculo de la Beijing-a Internacia Klubo disdonas diplomojn.

Diplomoj de Tajĝiĉjuan-kurso



Donaco al la instruisto

por ke ankaŭ popolanoj de mia patrujo lernu *tajĝiĉjuan.*"

Je la komenco kaj fino de ĉiu kurso inaŭgura kaj diplomdona ceremonioj estis okazigitaj respektive. La ceremonioj estis simplaj, tamen la etoso vigla. En la diplomdona ceremonio la reprezentantoj de la kursanoj el malsamaj kontinentoj devis prezenti sian *tajĝiĉjuan*-arton. La edzino de Bush, la estro de la antaŭa usona interliga oficejo en Ĉinio, eĉ demetis siajn pikkalkanumajn ŝuojn, nudpiede sursceniĝis kun ĝojo kaj bone faris prezentadon. Vidante tion, ŝia edzo eksplodis per ridego. En tia ceremonio la kursanoj ricevis Diplomon de *Tajĝiĉjuan*-kurso de la Beijing-a Internacia Klubo. Fremdlandaj amikoj rigardas la diplomon kiel fierindaĵon kaj valoran memoraĵon.

ZITIAN:

TAJĜIĈJUAN

TAJĜIĈJUAN estas unu el la ĝenroj de ĉina tradicia luktarto. Ĝi kreiiĝis en kvardekaj jaroj de la deksepa jarcento, ensorbante en si la plejparton de esencaĵoj de dek ses elstaraj ĝenroj de luktarto popularaj en la popolo en Ĉinio dum la meza parto de la deksesa jarcento. Ĝi karakteriziĝas per mildaj kaj malrapidaj movoj egalritmaj kaj taŭgas por maljunaj aŭ malfortaj personoj. Praktikado de ĝi bone efikas por refortigi la korpon kaj kuraci iujn kronikajn malsanojn.

Dum ekzercado de *tajĝiĉjuan* oni devas preskaŭ ĉiam teni siajn gambojn fleksitaj kaj alterne meti la ĉefan korpopezon sur unu el ili, tiel ke la muskoloj de la gamboj estas alterne strecitaj kaj malstrecitaj. Tio akcelas la cirkuladon de la sango. Ju pli malalte oni tenas sian trunkon, des pli forte oni ŝarĝas la muskolojn. Laŭ tio oni povas laŭvole ricevi la gradon de ekzerco-forteco deziratan kaj konvenan por si. Dum ekzercado oni devas spiradi profunde kaj milde, por ke oni ne spiregu eĉ iom ŝvitante. Ĝi taŭgas ankaŭ por personoj, kiuj suferas malsanon en la koro aŭ sangvazoj, se oni ekzercas ĝin en konvena grado konforme al sia korpostato. Plie kiam oni ekzercas ĝin kun profunda spirado per mallevo kaj levo de la diafragmo, pli bonan efikon oni ricevas pro milda premado al la stomako, hepato kaj intesto, ĉar tia masaĝo povas plibonigi ilian funkciadon.

Krome, ĝi postulas altan koncentradon de la spirito por direkti la movojn de la okuloj, manoj kaj piedoj por ke ĉiuj movoj de la korpopartoj estu farataj samtempe kaj harmonie. Tio tre utilas por plibonigi la funkciadon de nerva sistemo. Precipe la parto de cerebra kortekso, kiu koncernas la movojn, estas altgrade ekscitata, dum la cetera parto, kiu koncernas la korpoparton de malsano, ricevas plenan ripozon. Tio estas negativa induktado en fiziologio. Tial konstanta ekzercado de *tajĝiĉjuan* donas tre bonan efikon por fortigi la funkcion de la nerva, digesta kaj korasangvaza sistemoj kaj por fortigi la sanon kaj rezistpovon kontraŭ malsanoj.

HONG YING:

BONA BOFILINO

Ŝi kaj ŝia bopatrino interkonsiliĝas pri preparo de nova vesto.

EN la orienta kvartalo de Beijing (Pekino) estas granda korto, kie loĝas 45-jara virino Zhang Ruiyun. Ŝi laboras en la Asocio de la Ĉinaj Filmistoj. La loĝantoj de la korto ĉiuj laŭdas ŝin pro ŝia afabla prizorgado al sia bopatrino Vang Ruolan.

Diplomitiĝinte el la universitato, Zhang Ruiyun edziniĝis al Zhang Junying, la filo de Vang Ruolan, en julio de 1956. La geedzoj amis kaj respektis unu la alian, la bopatrino kaj la bofilino harmoniis, kaj la tuta familio vivis gaje kaj feliĉe.

Tamen la vojo de vivo ne estas ebena. En 1964 Zhang Junying mortis pro malsano. Tiam Zhang Ruiyun jam estis patrino de du infanoj.

Kiam Ruiyun studis en universitato, ŝi jam aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio. En 1960 ŝi honore ĉeestis la Beijing-an Kongreson de Aktivuloj en la Socialisma Konstruado. En la oficejo oni gloras ŝin kiel bonan funkciulon, kaj en la hejmo la bopatrino laŭdas ŝin kiel bonan bofilinon. Estas tute nature, ke oni montras grandan zorgon pri ŝia persona vivo. Post la morto de ŝia edzo multaj bonkoruloj klopodis por konigi al ŝi virojn por reedzinigi ŝin, sed ŝi danke ilin rifuzis.

Tiel pasis tri jaroj. La bopatrino, kvankam iom obstina, estas prudenta kaj kompatis Ruiyun pro ŝia soleco. Sekve ŝi klopodis por elekti viron por ŝi sen ŝia scio, sed ne trovis taŭgan. Ŝi diris: "Ruiyun estas eminenta en laboro kaj en moralo, do ankaŭ ŝia estonta edzo devas esti bona."

En la Financa kaj Komerca Sekcio de la Beijing-a Revolucia Komitato laboras Li Xicheng, kiu kompatas la bopatrinon de Ruiyun trafitan de malfeliĉo en la maljuneco kaj admiras Ruiyun pro ŝia respekto al sia bopatrino. Li enamiĝis al Ruiyun. Xicheng estas iom pli aĝa ol ŝi. Li ekpartoprenis en la revolucia laboro en la aĝo de dekkelke da jaroj, en sia hejmloko de Shandong-provinco. Poste li edziĝis al vilaĝanino. En 1972 lia edzino mortis de malsano. Tiam ilia filo jam edziĝis, kaj ilia filino estis nur sepjara. Ĉar Xicheng estas honesta kaj respektas la bopatrinon de Ruiyun, Ruiyun konsentis edziniĝi al li.

Je la 9-a de majo, 1972, Li Xicheng transloĝiĝis en la hejmon de Zhang Ruiyun, kaj nova familio tiel formiĝis.

La bopatrino ŝatas akvomelonon, kaj dum somero Ruiyun kaj Xicheng aĉetas tion por ŝi de tempo al tempo. Wang Ruolan ne kutimas trinki bovinan lakton, tamen por ŝia sano Ruiyun kaj Xicheng ankoraŭ mendas lakton por ŝi. Ili admonis ŝin dirante: "Trinku lakton. Ĝi utilas

al via sano. Vi devas vivi ĝis kiam vi propraokule vidos plenumiĝon de la modernigo de la patrujo." Iliaj dolĉaj vortoj plezurigis la koron de la maljunulino.

Foje ŝi flustris al Ruiyun en la orelon: "Vi trovis filon por mi." Ruiyun ruĝiĝis kaj diris mallaŭte: "Panjo, estu trankvila. Ni bone prizorgos vin dum la tuta vivo."

Ruiyun tre respektas la bopatrinon. Kiam la familio altabliĝas por manĝi, ŝi unue plenigas ŝian bovlon. Kiam venas gasto, ŝi ĉiam prezentas ŝin kiel sian propran patrinon. Se io ajn okazas en la familio, ŝi konsiliĝas unue kun ŝi. Iun vesperon de aŭtuno en 1972 Ruiyun eniris ŝian ĉambron kaj diris: "Panjo, mi havas aferon por interkonsiliĝi kun vi." "Kia afero?" demandis la bopatrino. "Mi volas enhospitaliĝi por abortigo." "Abortigo!" mire diris la bopatrino, "Pro kio, Ruiyun?" "Panjo, mi jam havas du filojn kaj ne volas pli." "Ruiyun, vi bone pripensu. Kiel ĝojos Xicheng, se vi naskos ĉarman bebon. Kaj plie, nia familio ankoraŭ ne havas knabinon." Ruiyun sekvis ŝin per la vortoj: "Se vi volas knabinon, tio estas facile efektivigebla. Xicheng kaj mi jam interkonsentis venigi lian filinon Fagui de la hejmloko al Beijing. Ĉu bone?" "Jes, mi vere stultas, vi ja estas prudenta kaj klarvida," diris la bopatrino kun rideto.

Ruiyun prizorgas ne nur la bopatrinon ĉe si, sed ankaŭ la bopatrinon kun la aĝo de pli ol 80 jaroj en Shandong-provinco. Ĉiumonate ŝi sendas monon al la lasta kaj la pliaĝa duonfilo en Shandong. Krome ŝi ofte ekspedas al ili manĝaĵojn, vestaĵojn kaj aliajn vivnecesaĵojn. La patrino de Xicheng skribis leteron al sia filo: "Xicheng, vi ja havas bonan edzinon. Kvankam mi estas fore de vi je centoj da kilometroj, tamen mi estas trankvila."

Helpi sian plej junan filinon en lernado

Ŝi tondas la hararon al sia bopatrino.

Ĉe la Soleca Monto



Gruo-pavilono

La Aŭtuna Luno super la Kvieta Akvo



Ĉe la Epigrafia Societo Xiling

Xiling-ponto en malproksimo





Zhongshan-parko

La Okcidenta Lago en Printempo

de **WANG ZHENJUN**

Sur la Okcidenta Lago

La Okcidenta Lago de Hangzhou (Hangĝoŭ) en printempo aspektas kiel bela ĝardeno kun diverskoloraj floroj. La areo de la lazura lago estas ĉ. 5.6 kvadrataj kilometroj. Oriente de ĝi estas la urbo kaj en la suda, okcidenta kaj norda flankoj ĝi estas ĉirkaŭata de verdaj montoj. La digoj Sudi kaj Baidi, kvazaŭ du verdaj rubandoj, dividas la tutan lagon en tri partojn, nome la Internan, Eksteran kaj Malantaŭan Okcidentan Lakon. La Soleca Monto staranta sur la lago kiel floro tre plezurigas la okulojn. En la lago troviĝas tri insuletoj ombrumitaj de salikoj kaj ĉirkaŭe de la lago sin trovas grandaj kaj malgrandaj parkoj, florbedoj, gazonoj kaj fiŝbredaj basenoj, inter kiuj estas dek famaj pitoreskejoj nomataj Tri Pagodetoj en Lago, la Aŭtuna Luno super la Kvieta Akvo, Salikoj-ondoj kun Oriola Trilo, Flor-baseno kun Fiŝoj k.a. Ĉiuj ĉi tiuj vidaĵoj kune formas la ĉarman bildon de la Okcidenta Lago.

Apenaŭ ĉesis neĝblovado post la Printempa Festo, la umearboj de la Soleca Monto jam anoncas la alvenon de printempo per sia ekfloro. Aparte favora loko por apreci umeflorojn de la Okcidenta Lago estas Gruo-pavilono ĉe la norda piedo de la Soleca Monto. Tie loĝadis poeto Lin Hejing de Song-dinastio (960--1279 p.K.). La poeto tre amis umeflorojn kaj kreskigis pli ol 300 umearbojn ĉirkaŭ sia domo ĉe la montpiedo. Kaj krome li bredis gruon. Ĉiufoje, kiam alvenis gasto dum li forestis de sia domo por promeno, lia servoknabo elkaĝigis kaj flugigis la gruon, kaj vidinte la flugantan gruon Lin tuj revenis hejmen por akcepti la gaston. Oni diras, ke la 300 umearboj forvelkis post lia forpaso kaj baldaŭ ankaŭ la

La Florbasena Parko

gruo mortis kun ĉagrena blekado. Por memorigi la poeton, oni plantis poste multajn umearbojn ĉe la Soleca Monto kaj konstruis la Gruo-pavilonon. Se oni staras en la pavilono, oni povas vidi maron de umefloroj kun intensa aromo.

La Parko Zhongshan (Jatsen), la Epigrafia Societo Xiling kaj la Aŭtuna Luno super Kvieta Akvo troviĝas ĉe la Soleca Monto. La Parko Zhongshan estas negranda ĉarma florĝardeno. Antaŭe ĝi estis parto de la portempa palaco de imperiestro de Qing-dinastio (1644—1911 p.K.). Post la Revolucio de 1911, ĝi estis transformita en parkon kaj pli poste ĝi ricevis la nomon Zhongshan por memorigi la grandan ĉinan revolucian pioniron Sun Zhongshan. La Epigrafia Societo Xiling fondita en 1904 p.K. estis organizo, kiu okupiĝis pri studo de gravuraĵoj sur metalaj kaj ŝtonaj pecoj. En la 5-a de aprilo kaj la 9-a de la naŭa monato lunkalendara, gravuristoj de kaligrafiaĵoj kolektiĝis tie por studaj aktivadoj. Antaŭ nelonge, tiu societo jam estis sankciita de la ŝtato kiel oficiala eldonejo. La sidejo de tiu societo estas elita parto de la pitoreskejoj de la Soleca Monto. En la ne tre vasta tereno de ĝi harmonie lokiĝas pontetoj, baseno, kioskoj, elegantaj domoj kaj antikvaj kulturaj restaĵoj en la tradicia stilo de la ĉina ĝardena arkitekturo. Se oni rigardas malproksimen sur la plej alta loko de tiu pitoreskejo, oni povas vidi, ke la tri insuloj de la Okcidenta Lago flosas en la lazura akvovastaĵo limtuŝiĝanta kun la ĉielo, kaj sentas grandan plezuron pro la bela pejzaĝo.

Promenante laŭ la digo Baidi, oni vidas alian belan scenon de la naturo. Sur la digo staras vico de salikoj kaj persikarboj intermikse plantitaj. La graciaj plorsalikoj en kontrasto kun la brilkoloraj persikfloroj aspektas kvazaŭ bela brokato. Se oni iras suden laŭ la bordo de la lago, preterpasas la Lagobordan Parkon, baldaŭ oni atingas la luman belan pitoreskejon Salikojondoj kun Oriola Trilo, kie pendantaj salikbranĉoj karesas la surfacon de la lago, aromas rozoj kaj trilas orioloj, prezentante veran ĉarmon de printempo. En la jaro 1962, kiam la Japana Delegacio de Gifu vizitis Hangzhou, oni starigis, sur la gazono ĉirkaŭata de arboj kaj floroj oriente de ĝi, memorŝtonon kun enĉizitaj vortoj signifantaj "JAPANIO KAJ ĈINIO NENIAM INTERBATALOS", kiu esprimis la belan volon de la ĉina kaj japana popoloj kunvivi pace kaj amike de generacio al generacio.

En printempo, la verdaĵoj de la lago estas ofte duŝataj de pluvetoj, kaj pro tio la lago aspektas ankoraŭ pli freŝa. Se oni ĉirkaŭrigardas, malrapide remante sur la lago, oni povas vidi la belajn montojn en tri flankoj, kiuj klare speguliĝas en la klara akvovastaĵo, kaj sentas koran plezuron. Eble vi povas aŭdi de boatisto jenan belan legendon pri la Okcidenta Lago: En antikva tempo jada drako kaj ora fenikso trovis blankan ŝtonon sur mara insulo. La ora fenikso ĝin bekadis kaj la jada drako ĝin gratadis per siaj ungoj. Ili tiel laboradis jaron post jaro kaj fine turnis la ŝtonon

en brilan perlon. Ĉie, kien la radioj de la perlo atingis, beliĝas la montoj kaj riveroj kaj la homoj fariĝas longvivaj kun abundaj rikoltoj. Baldaŭ la ĉiela kortego informiĝis pri tio. La diino Wang Mu pensis, ke tio estas rara trezorajo de la homa mondo, kaj sendis sian serviston al la mara insulo. La sendito forprenis la brilan perlon, kiam la drako kaj fenikso dolĉe dormis. Rimarkinte la perdiĝon de la perlo post vekiĝo, la jada drako kaj ora fenikso ĉie ĝin serĉadis. Post kelkaj tagoj, ili subite vidis lumstrion, rapidis en ĝia direkto kaj fine venis en la palacon de la diino, kie ili trovis, ke la diino Wang Mu tenas la perlon sur sia manplato. La jada drako kaj ora fenikso sin ĵetis al ŝi kaj ŝin faligis. La diino tiam lasis fali la perlon el la ĉielo kaj kristale klara lago aperis sur la tero, kiam la trezorajo atingis ĝin. La jada drako kaj la ora fenikso ne volis forlasi sian brilan perlon kaj turniĝis en la du montojn Jada Drako kaj Fenikso sude de la lago por ĝin gardadi. Poste, la Okcidenta Lago estas rigardata kiel brila perlo kaj famiĝis en kaj ekster nia lando.

Ekzistas ankoraŭ multaj aliaj interesaj legendoj pri tiu lago, sed efektive ĝi estis, en antikveco, kurbajo de Qiantang-rivero. Longa sedimentado apartigis tiun parton de la rivero, turnis ĝin en lagon kaj formis la terpecon nun okupatan de la urbo Hangzhou. La nomo de la lago estis ŝanĝita plurfoje kaj nur en Tang-dinastio (618-907 p.K.) oni ekuzis la nomon Okcidenta Lago, pro tio ke la lago troviĝis okcidente de la urbo. Antaŭ Tang-dinastio, la lago ne estis fame konata. En Tang-dinastio oni dragis la lagon kaj konstruis digon al ĝi, kaj iom post iom ĝi altiris al si atenton.

Remante antaŭen, baldaŭ oni atingas la insulon Xiaoyingzhou kun areo de 7 hektaroj. Ĝi estas la plej granda el la tri insuloj en la lago. Tiu insulo kun ĉirkaŭa digo estas efektive interna lageto en kies mezo estas insuleto. Por atingi la insuleton en ĝi kaj la kontraŭan bordodigon oni devas trairi ponton kun 30 zigzagoj. Sur la ĉirkaŭdigo estas ombroriĉaj arboj inter kiuj vidiĝas belaj konstruajoj, artefaritaj montetoj kaj framoj kun grimpaj florplantoj. Pro la artisma aranĝo promenante tie, oni povas vidi, je ĉiu paŝo, novan pejzaĝon kun spegulajo en la akvo. En la lazura akvo sude de la insulo staras triangule tri ŝtonaj pagodetoj botelformaj. Remante en plenluna nokto, oni povas vidi ĉarman pejzaĝon kun la luno kaj la pagodetoj speguliĝantaj en la akvo. Precipe en la aŭtunmeza nokto en aŭgusto, kandeloj estas bruligitaj en la pagodetoj kaj lumigas la maldikan paperon ŝirmantan la rondajn truojn. Tiam la spegulajoj de la lumoj tremantaj en la akvo vidiĝas kvazaŭ lunoj. Tie estas unu el la dek elstaraj pitoreskejoj nomata Tri Pagodetoj en Lago. Nun kutime oni uzas tiun nomon kiel titolon por la tuta insulo Xiaoyingzhou.

Post vizito al la Tri Pagodetoj oni povas pririgardi la Florbasenan Parkon, antaŭe nomatan Florbasenon kun Fiŝoj, kiu situas en la Interna Okcidenta Lago ĉe la suda fino de la digo Sudi. Ĉar en Song-dinastio, fontoakvo ĉe la piedo de la Flora Monto enfluas en la lagon ĉe tiu loko, tial ĝi estis nomata Florbaseno. En la regperiodo de Kangxi de Qing-dinastio (1662—



1. *Soleca Monto*
2. *Parko Zhongshan*
3. *Epigrafia Societo Xiling*
4. *La Aŭtuna Luno super la Kvieta Akvo*
5. *Digo Baidi*
6. *Digo Sudi*
7. *Ekstera Okcidenta Lago*
8. *Interna Okcidenta Lago*
9. *Salikoj - ondoj kun Oriola Trilo*
10. *Tri Pagodetoj en Lago*
11. *La Florbasena Parko*
12. *Monto Jada Drako*
13. *Monto Fenikso*
14. *Rivero Qiantang*
15. *Longjing*
16. *Lingyin - templo*
17. *Templo de Yue Fei*
18. *Nebula Kaverno*

1723 p. K.), oni konstruis sude de la Florbaseno kioskon kaj kvadratan basenon por bredi eksterordinarajn fiŝojn kaj turnis tiun lokon en unu el la dek pitoreskejoj. Sed antaŭ la Liberiĝo, velkis la arboj ĉe la Florbaseno, ŝtopiĝis la fluo kaj detruiĝis la fiŝbreda baseno, do restis nur la nomo de tiu pitoreskejo. Post la Liberiĝo, dufoje oni faris grandskalan rekonstruadon al ĝi, plivastigis ĝian areon ĝis pli ol 20 hektaroj kun bele aranĝitaj gazono, orfiŝa baseno, ĝardeno de peonioj, florbaseno kaj densa arbaro. Hodiaŭ tiu loko jam fariĝis unu el la ĉefaj pririgardindaj pitoreskejoj de la Okcidenta Lago. Meze de aprilo, la vizitantoj al tiu loko amase fluas al la Peonia Ĝardeno por apreci ĉarmajn peoniajn florojn. Peonio estas nomata en nia lando la reĝino de la floroj. La peoniaj floroj en tiu ĝardeno estas grandaj kaj brilkoloraj kaj dank' al artisma aranĝo de ili kun aliaj florplantoj kaj groteskaj ŝtonoj, tiu loko plenas je gusto de ĉinstilaj pentraĵoj.

Se oni veturas de la parko sudokcidenten laŭ la vojo serpentumanta sur la monto, oni povas atingi la faman tearbkulturejon Longjing. En tiu loko ĉie sur la monto kreskas freŝe verdaj tearbetoj, kaj knabinoj kolektantaj tefoliojn diligente laboras inter ili. Longjing-teo jam havas historion de pli ol 1,200 jaroj. Ĝi estas unu el la kvar plej famaj specoj de ĉina teo kaj karakteriziĝas per freŝa verdo, aromo, plaĉa gusto kaj bela formo. Aparte bona estas la printempa teo kaj estas vera ĝuo por la vizitantoj trinki tason da nova teo en tiu loko.

Ĉe Longjing troviĝas klara fonto, kiu neniam senakviĝas. En antikveco oni kredis superstiĉe, ke ĝi estas ligita kun la maro kaj vivas drako en ĝi, tial ĝi ricevis la nomon Longjing, kiu signifas Drako-puton. Ĉirkaŭ la fonto estas artefarita monteto kun maljunaj arboj kaj glicineoj. Apud la fonto staras stranga ŝtono 2 metrojn alta kun formo de moviĝanta drako. Kaj krome tie troviĝas ankaŭ Tingquan-kiosto kaj aliaj historiaj lokoj en riĉaj ombroj.

Apud la bela Okcidenta Lago estas la antikva urbo Hangzhou kun historio de pli ol 2,000 jaroj, kie abundas historiaj kulturaj objektoj kreitaj de la laboranta popolo. Tiu urbo dufoje servis kiel ĉefurbo dum 200 jaroj en la historio, kaj pro tio ĝi havas multe da historiaj objektoj de la koncernaj periodoj. Nun oni jam faris rekonstruon aŭ riparon al la difektitaj inter ili. Lingyin-templo en la montregiono okcidente de la lago estas la plej granda templo de Hangzhou. Post grandskala riparo en la lastaj jaroj, tiu antikva templo kun historio de pli ol 1,600 jaroj aspektas ankoraŭ pli majesta kaj bela kaj la budhaj statuoj en ĝi brilas en ora koloro. La Templo de Yue Fei okcidente de la Soleca Monto estis konstruita por memorigi la faman generalon Yue Fei de Song-dinastio, kiu firme rezistis kontraŭ invado de fremda nacio. En la templo staras gigantaj antikvaj arboj kaj ĝia grandioza halo nun riparata baldaŭ malfermiĝos al la turistoj. En la montoj ĉirkaŭ la Okcidenta Lago troviĝas nombro da kavernoj inkluzive de la Nebula Kaverno kun delikataj ŝtonaj gravuraĵoj. Streĉa ordigado kaj konstruado estas nun farataj al ili.

La digo Baidi en malproksimo



La Loko de Amo en la Vivo

(Daŭrigo)

VI

Se Yamei jam informiĝis pri mia rilato kun Lu Yuchun, do morgaŭ tiu novaĵo jam disvastiĝos tra nia tuta laborejo. Kredeble Majstro Wei bedaŭre suspiros pro mi. Mi certe ricevos diversajn rigardojn, pridemandojn, ambiguajn aludojn kaj eĉ publikajn mokojn. Kaj verŝajne, ekzamena pridemandado de miaj gepatroj al mi okazos jam ĉi-vespere . . .

Mi ne timas ĉion ĉi tion. Sed kiel mi devas ĝuste trakti la aferon?

Se mi konfesos, ke mi enamiĝis al juna kukbakisto, ili eble ekmiros, bedaŭros, mokos, malesperiĝos . . .

Sed mi nepre devas klarigi al ĉiuj, ke mi trovis lin ne laŭ kalkulo, en nia interrilato tute ne ekzistas faktoro de egalvalora interŝanĝo — nur se li restos nobla, justama kaj bonmorala, mi sentos feliĉon kaj havos energion por progresado pro kunvivo kun li kaj neniam forlasos lin, eĉ se li ĉiam laboros kiel kukbakisto — unuvorte, mi amas lian personon, sed ne lian titolon aŭ riĉaĵon!

Mi revenis, mi ne sciis kiel, al la pluretaĝa domo, en kiu loĝas mia familio. Post la ĉ. cento da fenestroj de tiu domo loĝas diversaj familioj. Kompreneble, plejparto de ili estas harmoniaj kaj feliĉaj. Sed iufoje, tetaso flugis el fenestro de ĉambro unua-etaĝa en la tria apartamentaro, kaj feliĉe ĝi vundis neniun. Oni diris, ke tio okazis pro interbatado de nova geedza paro. Foje mi vizitis ilian apartamenton — mankis al ĝi neniu bezonaĵo, tamen al tiu familio mankis la plej grava afero "amo". Eble multaj estas la kaŭzoj de tiu kazo. Sed tamen ĉu unu el la gravaj kaŭzoj ne estas tio, ke en la lastaj jaroj ne troviĝas loko por amo?

Malrapide mi iris supren tiel meditante laŭ ŝtupetaro. Ho, jen la unua etaĝo, kie loĝas onklino Feng! Frue en la Studenta Movado de la 9-a de Decembro en 1935, ŝi jam estis respondeculino de la subtera partia organizo en iu universitato. Nur el la aŭditaj fragmentoj pri ŝia vivo mi jam scias, ke ŝi travivis grandajn eventojn. Post la Liberiĝo, ŝi laboras en iu eldonejo. Preskaŭ ĉiuj loĝantoj de la domo estimas kaj ŝatas ŝin, kaj krome oni sentas ĉe ŝi iom da mistero — precipe ni junulinoj emis kaŝe priparoli tion — kial onklino Feng ne edziniĝis? Tiel bona virino kiel ŝi ne povis ne havi amantojn en sia juneco. Kial do ŝi rifuzis ilian amon? Ĉu ŝi trovis neniun amindan inter siaj adorantoj? Eble ŝi esprimas per sia vivo, ke en la vivo de revoluciulo amo ne nepre devas okupi lokon . . .

Ĉiuj diras, ke la pensoj de la junuloj vagas sencĉese kiel nuboj. Tiel same estas ankaŭ ĉe mi. Subite mi decidis viziti neatendite onklinon Feng anstataŭ tuj reveni al mia hejmo en la tria etaĝo. Ĉu mi ne trovos en ŝi plej aŭtoritatan solvanton de la problemo, kiu bolas en mia koro?

Mi etendis la manon kaj ekfrapis je la pordo.

VII

Tute neatendite, ke la unuaj vortoj diritaj de onklino Feng sonis jene, post kiam ŝi ameme sidi-

gis min sur sofo: "Kio okazis al vi, Xiaoyu? Kredeble vi enamiĝis?"

Kvazaŭ infano kaptita de la patrino dum ŝtelo de bombono, mi tuj klinis la kapon pro honto kaj komencis knedi angulon de la basko — ho, onklino Feng, kiel akrajn okulojn vi havas!

Verŝante teon kaj prenante dolĉaĵon por mi, onklino Feng min demandis afable: "Kia estas la junulo? Ĉu vi povus diri al mi?"

Mi levis la kapon kaj rimarkis, ke onklino Feng, kiu havas tutkape blankajn harojn kaj tamen delikatan vizaĝon kun ruĝa nuanco, fiksrigardis min per okuloj plenaj de amemo kaj simpatio. Tute solviĝis mia singardemo. Post kiam onklino Feng sidiĝis sur la sofo kontraŭ mi, mi tuj elverŝis al ŝi ĉion pri mia Lu Yuchun, pri la disputo inter ni kaj pri niaj imagoj pri la estonto kaj pri demandoj kiujn ni ne komprenis, ĉion senrezerve. Je la fino de mia parolo, mi serioze elmetis la demandon pri "la loko de amo en la vivo".

Mia voĉo perdiĝis kaj en la ĉambro ekregis eksterordinara silenteco. Kun la malvarmiĝinta tetaso en siaj manoj, onklino Feng mallarĝigis siajn okulojn, kvazaŭ fiksrigardanta ion nevideblan. Ŝi silentadis dum pluraj minutoj.

Mi demandis ŝin malpacience: "Onklino Feng, ĉu amo, eĉ sana amo, estas, por revoluciulo, ia balasto, ia luksaĵo, io kiel eble plej multe limigenda?"

Evidente onklino Feng ekmiregis, ke tia knabineto kiel mi elmetis tian demandon. Ŝi levis siajn grizajn brovojn kaj demandis kun mira rigardo al mi: "Kiu tiel diris al vi?"

"Neniu rekte tiel diris al mi, sed en tia atmosfero mi kreskadis de elementlernejano ĝis la nuna stato. Ekzemple, oni eĉ ĉiam komentis al ni pri la baleto 'Blankhara Knabino', ke inter la herooj Dachun kaj Xi-er ekzistas nur klasa amo, kaj ke tiu, kiu rigardas ilin kiel gefianĉojn, falas en reviziismon . . ."

Onklino Feng indigne residiĝis sur la sofo, ekfrapis ĝian apogbrakon per la dekstra pugno kaj diris kapskuante: "Reviziismo estas tia neigo de la deca loko de amo en la vivo de proleta revoluciulo . . . "

Ĉu mi devas penti aŭ ĝoji pro miaj vortoj senpripense eldiritaj en tiu momento? Tiam mi diris maldiskrete: "Sed vi tamen vivas tre bone sen amo, ĉu ne? Kaj tio tute ne malhelpis, ke vi fariĝis bona revoluciulo!"

La mieno de onklino Feng subite ŝanĝiĝis. En la komenco mi pensis, ke ŝi ofendiĝis pro ŝoko al ŝia memestimo, kaj poste mi pensis, ke ŝi eble pripensas kiamaniere diri al mi, ke tio estas nur escepto. Sed mi tute eraris. Apogante la dorson al la sofo, onklino Feng silente meditis por momento kun fermitaj okuloj kaj poste diris al mi kvazaŭ donante ordonon: "Xiaoyu, bonvolu iri post la ekranon!"

Dum mi atendis senkomprene post la ekrano, aŭdiĝis la voĉo de onklino Feng de ĝia alia flanko: "Ŝaltu la tablolampon." Ho, ĉe la lampo staras foto en kaŝtankolora vitrita kadro! Sur la foto vidiĝas brava junulo en ĉina robo kun tuko el dikaj lanfadenoj ĉirkaŭ la kolo. Li ridas serene lasante la alblovantan venton malordigi lian densan hararon . . . Apude de ĝi staras alia vitrita kadro en kiu estas la poemo "Ĝoja Informo" propramane skribita de onklino Feng:

Vidante vin en sonĝo je la mila fojo,
hodiaŭ mi eklarmas tamen nur pro ĝojo.
Venkitas la demonoj, la ĉiel' serenas,
la ruĝan parti-flagon fortaj manoj tenas.
Torentas tajdo reordiga tra la lando,
por forigi l' influon de l' kvaropa bando.
Ne ridu, ke la amatino jam blankhara
korverŝas al sia hero-martiro kara:
Ne vane floris via sanga floro,
de via sang' vigliĝis mia koro.
Je l' tago, kiam ĉie pompos fruktoj, floroj,
en sonĝ' ni festos kune per poem' de gloro.

Mi rigardis la bravulon en la foto kaj silente legis la poemon, mi relegis la poemon kaj denove rigardis la bravulon. Nun mi komprenas ĉion. Oj, mi suspiris bedaŭrante, ke onklino Feng ne akiris feliĉon de amo, sed efektive ĝis nun ŝi ankoraŭ konservas la forton de amo! Vidu, tiel forta, virta kaj konstanta estas la amo de revo-

luciulo, ĝi disradias senfine energion por progreso kaj lumon de strebado . . .

Kiel mi deziris tiumomente, ke Lu Yuchun estu ĉe mi, por ke nia amo povu ĉerpi valoregan nutraĵon el la foto kaj la poemo!

Kun larmovualitaj okuloj mi revenis al onklino Feng kaj petis, ke ŝi rakontu al mi sian amohistorion. Ŝi jesis kaj ekrakontis malrapide:

"Xiaoyu, en la Movado de la 9-a de Decembro li estis ĝuste tia kian vi ĵus vidis; li estis flamanta fajro, brilega fajro neestingebla de ventego aŭ malvarma akvo . . . Ni ekamis unu la alian en komuna batalo, kaj en reciproka amo ni nin ĵetis en komunan batalon . . . Sankciite de nia supera instanco ni geedziĝis, kaj post la mallonga sed varma geedziĝa ceremonio ni, kune kun la celebrantaj gekamaradoj, prenis flagojn kaj sloganajn rubandojn, rekte aliĝis al la manifestacia vicaro kaj antaŭen marŝis grandpaŝe brak-en-brake, laŭte kantante kontraŭjapanajn kantojn . . . Iuvespere en aŭtuno de 1937, li hejmen revenis kaj ĝoje diris al mi decidon de la partia organizo, ke mi translokiĝu al Yan'an kaj li restu en la blanka regiono por daŭrigi la bataladon. Aŭtuna sablovento frapadis la fenestropaperon kaj en mia koro cirkuladis ĝojo kaj bedaŭro — Ho, Yan'an, tie estis la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Mao. Kiel mi deziris min ĵeti en la sinon de la Partio-patrino! Kiel bone estus, se li povus iri kune kun mi . . . Sed mi sciis, ke tio estis decido laŭ bezono de la batalo. En tiu nokto, ni estingis la lampon tamen ne povis endormiĝi. Ni interkonsentis, ke pro tio ke ni ne povos interŝanĝi korespondaĵojn, mi skribos miajn vortojn, kiujn mi deziros skribi al li el Yan'an, en notlibron, kaj montros ĝin al li, kiam iutage li feliĉe venos al Yan'an . . . Kaj kiam mi venis al Yan'an, mi vere tiel faris. Mi tre malofte ricevis informojn pri li, tamen mi povis imagi al mi lian figuron, lian mienon, lian ĉikanon al la malamikoj kaj lian humuron al la kamaradoj . . . Iumatene de frua vintro de 1940, kiam mi estis skribanta la 25-an leteron al li en kaverndomo, iu gvidanta kamarado venis vidi min. Senvorte li donis al mi tolan pakaĵon. Ĝi estis alportita tra multaj manoj el la blanka regiono. Per tremantaj manoj mi malvolvis la pakaĵon kaj trovis en ĝi la foton de la martiriĝinto kiun vi ĵus vidis. La gvidanta kamarado sincere interparolis kun mi dum la tuta antaŭtag-

mezo. Grandaj larmeroj trafluis miajn ardajn vangojn kaj mi mordadis la lipon por ne plori laŭte. Li estis arestita antaŭ duona jaro kaj heroe oferis sian vivon. La malamikoj neniigis lian korpon, sed liaj figuro kaj spirito eterne vivas en la koro de mi kaj miaj kamaradoj. Posttagmeze de tiu tago, mi skribis la 26-an leteron al li en mia notlibro, kaj mi sentis kvazaŭ li povus ĝin ricevi . . . Tiun kutimon mi tenadis jam pli ol 30 jarojn. Mi skribis al li la novan disvolviĝon de la revolucia situacio kaj miajn travivaĵojn en la batalado, kaj dividis kun li ĝojon kaj malĝojon . . . La poemo vidita de vi estas kopiita el letero skribita al li en la antaŭlasta jaro . . . ”

Mi aŭskultadis kun plena atento. Vespera krepusko jam kovris la tutan ĉambron tiel ke mi jam ne povis klare vidi la vizaĝon de onklino Feng. Nur ŝia okulparo kun neestingeblaj flamoj de juneco ankoraŭ briladis.

“Ho Xiaoyu! Amo ja estas komplika kaj delikata afero,” fine onklino Feng diris al mi pripensante. “Mi opinias, ke amo devas esti fondita sur komuna revolucia aspiro, devas esti provita tra batala vivo kaj senĉese riĉigita kaj altigita kun la disvolviĝo de la vivo . . . Kompreneble, ankaŭ reciproka plaĉo je karaktero, aspekto kaj sintenado estas nemalhaveblaj faktoroj. Se iu forgesas la revolucion pro amo, li metas amon sur maldecan lokon kaj falos en la burĝan marĉon de amo super ĉio kaj eĉ povos fari malutilaĵon al la revolucio. Se iu trovas, ke amo stimulas lin labori pli entuziasme, tio pruvas, ke lia amo estas metita sur la ĝusta loko, kaj tiam li povas sperti plej grandan feliĉon. Unuvorte, amo okupas gravan lokon en la vivo de revoluciulo . . . ”

Tion dirante, onklino Feng emocie stariĝis. Ankaŭ mi ekstaris emocie, alpaŝis kaj diris premante ŝian manon: “Onklino Feng, tuj verku libron pri ĉio kion vi rakontis al mi. Kiel ni bezonas tiajn inspiron kaj gvidon!”

Onklino Feng pripensis kaj diris kapjesante: “Mi nepre klopodos por tion fari. Ho, Xiaoyu,

mi trovas, ke la amo inter vi kaj Yuchun estas tre bela, vi amu kuraĝe!"

Pretervole mi min ĵetis en ŝian sinon. Mi neniam sentis min tiel komprenema, tiel feliĉa.

Post kelkaj minutoj, aŭdiĝis ekscitiĝaj paŝoj sur la ŝtupetaro — mi kuris al la hejmo en la tria etaĝo. Ĉu la gepatroj hodiaŭ pridemandos min aŭ ne, mi decidis malfermi al ili mian koron kaj mi kredis, ke mi ricevos de ili benon kaj konsilojn; kaj krome mi decidis fari raporton al Majstro Wei morgaŭ frumatene. Mi kredas, ke fine li levos la montrofingron de sia kaloza dekstra mano, kaj montrante mian nazon per ĝi li diros en tono tute malsama ol tiu uzata hodiaŭ posttagmeze: "Ho vi! ho nia bravulino Meng Xiaoyu! . . . "

(Fino)

(Ilustrita de **Huang Jing**)

Gastronomio

Kandizita Porkaĵo

Materialo:

duongrasa senhaŭtigita porkaĵo kurita en akvo	150 gramoj
sukero	100 gramoj
kokovo	1
koloraj fadenformaj konfitaĵoj	1 gramo
konfitita osmanto	0.5 gramo
malseka amelo	50 gramoj
faruno	25 gramoj
porka graso fandita	500 gramoj
(konsumiĝos	40 gramoj)

Preparado:

1. Unue tranĉu la porkaĵon en pecojn kun longeco de 3-4 centimetroj, larĝeco de 0.7 centimetro kaj dikeco de 1 centimetro. Metu la senŝeligitan ovon en tason, aldonu al ĝi la malsekan amelon, farunon kaj 75 gramojn da akvo kaj kirlu ilin. Metu la viandpecojn en la ovan gluaĵon.

2. Varmigu la porkan grason en pato sur akra fajro kaj antaŭ kiam ĝi fariĝis tro varma enmetu la viandpecojn en la paton kaj fritu ilin por 1-2 minutoj. Kiam la viandpecoj flaviĝis, elversu ilin en kribrilon kaj forigu la defalintajn ovaĵojn.

3. Metu sukeron en la saman paton sur milda fajro. Post ĉirkaŭ du minutoj de rostado, kiam la sukero likviĝis, enmetu la osmantojn. Kaj tuj poste enmetu la frititajn viandpecojn en la paton kaj renversadu ilin kaj surversu la viandpecojn verdajn kaj ruĝajn konfitaĵojn fadenformajn. Poste versu la viandpecojn en grandan emajlitan pladon kaj ilin disigu, dum ili estas varmaj, por ke ili ne gluiĝu unu al alia. Kiam la sukero kandiĝas, metu la viandpecojn en teleron.

Karakterizaĵo:

La tiel preparita porkaĵo aspektas orflava kaj kristale brila kaj estas fragila, dolĉa kaj bongusta. Ĉar la viandpecoj estas envolvitaj per sukero, oni nomas la pladon kandizita porkaĵo.

Tridek Jarojn en la Ĉina Kamparo

de **JIN FENG**



Erwin Engst (maldekstre) kaj Joan Hinton en juneco

JAM en sia juneco usonaj amikoj Erwin Engst kaj Joan Hinton venis al Ĉinio kaj vivis tridek jarojn en ĝia kamparo.

EN YAN'AN

En la jaro 1946, ĝuste kiam la liberiga batalo de la ĉina popolo estis en malfacila periodo, la 27-jara Erwin Engst venis de Usono al Ĉinio kaj atingis Yan'an en oktobro de la sama jaro.

En marto de 1947, Kuomintango komencis grandskalan atakon al la Limregiono de Shaanxi (Ŝenhi)-Gansu-Ningxia (Ninghia) kaj la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio decidis forlasi Yan'an provizore. Tiam Kamaradoj Mao Zedong, Zhu De kaj Zhou Enlai akceptis usonajn amikojn Anna Louise Strong, George Hatem, Erwin Engst kaj Sidney Rittenberg. Erwin Engst estis mirigita, ke Kamarado Mao Zedong manĝis kaj interparolis kun ili serene eĉ en tiel serioza momento. Kamarado Zhou Enlai detale eksplikis al ili la situacion internacian kaj enlandan, kaj tiun de la Liberiga Milito kaj plurfoje diris, ke kvankam la usona registaro subtenas Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek), tamen la usona popolo estas amika al la ĉina popolo. Tio multe kortuŝis la usonajn amikojn. Ili ĉiuj, inkluzive de la 60-jara A. L. Strong, firme petis permeson por partopreni en la liberiga batalo de la ĉina popolo.

Erwin Engst kaj Joan Hinton sur la bordo de Yanhe-rivero



Dum la batalo por defendi la limregionon, niaj 20,000 ĈPLA-anoj kontraŭbatalis 200,000 kuomintangajn armeanojn. La batalo iris tre intense. En la kanonado la juna Erwin Engst kaj liaj kolegoj de Guanghua-kultivejo, en kiu li laboris siatempe, marŝis sur serpenta montovojeto kun dekoj da nederlandaj laktobovinoj. Iu kamarado de la kultivejo diris al li, ke en la malfacilaj jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito tiuj bovinoj nutris Yan'an-ajn infanojn per sia lakto

kaj post fondo de la nova Ĉinio la bredado de laktobovinoj devos esti disvolvita por ke la infanoj de la tuta lando havu freŝan lakton! Erwin Engst kiu havas profundan amon por laktobovinoj, kortuŝiĝis de tio. Sed estis malfacile transloki tiujn laktobovinojn, ĉar ili paŝis malrapide kaj estis facile rimarkeblaj de la malamikaj aviadiloj pro iliaj nigraj kaj blankaj makuloj sur la korpo. Erwin Engst ne sciis kion fari por ilin protekti. Sed la laboristoj de la kultivejo montris sian saĝecon kaj respondecon en tio. Ili plurfoje sukcesis transloki la laktobovinojn al sekura loko. Tio vekis ĉe Erwin Engst respekton kaj amon al la ĉinaj kolegoj.

Iun profundan nokton, Erwin Engst kaj du ĉinoj ascendis monteton. Rigardante lampolumon el vico da kavernodomoj ĉe montopiedo, unu el la ĉinoj levis sian dikan fingron kun mistera mieno. Tio tuj komprenigis al Erwin Engst, ke la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio ankoraŭ restis en norda Shaanxi kaj Kamaradoj Mao Zedong kaj Zhou Enlai ankoraŭ laboras en la kavernodomoj. Longe rigardante la lampolumon li pretervole ekpensis: La usonaj generaloj en la Pentagono de la transoceana Vaŝingtono estas cerbumantaj por helpi Kuomintangon ekstermi la Popolan Liberigan Armeon kaj la ĉinan revolucion. Sed, ĝuste en tiuj kavernodomoj, la gvida organo de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popolaj gvidantoj gvidas la popolan liberigan militon de la tuta lando kaj la ĉinan revolucion. Kia forto en la mondo povas frakasi tian partion kaj tian revolucion?

En aprilo, 1948, Yan'an finfine revenis en la sinon de la popolo. Erwin Engst ĝoje revenis al Yan'an. Tiam lia edzino Joan Hinton jam atingis Shanghai (Ŝanhajo) kaj baldaŭ venos al la liberigita regiono.

KUNIĜO DE LA VERO KAJ AMO

Estis la granda ĉina revolucio, kiu allogis Erwin Engst kaj Joan Hinton al Ĉinio.

Erwin Engst naskiĝis en kamparana familio de la ŝtato New-York. Kiam li studis duon-labore en la agronomia fakultato de la ŝtata uni-



En farado de ventomuelilo

La familio de Erwin Engst en kultivejo de antaŭurbo de Xi'an

versitato, li konatiĝis kun William Hinton, kiu studas en pli alta klaso. Ili loĝis kune kaj ofte diskutis pri gravaj aferoj de la mondo, pri la signifo de vivo kaj deziris dediĉi ĉion sian al la progresa afero de la homaro. Tiam la ĵus eldonita libro "Ruĝa Stelo super Ĉinio" verkita de la fame konata usona ĵurnalisto Edgar Snow prezentis al ili tute novan mondon, kiu forte allogas ilin. Ili decidis iri al Ĉinio, al Yan'an por vidi la grandan revolucion de Ĉinio kaj la heroan Ĉinan Laboristan-Kamparanan Ruĝan Armeon.

En la jaro 1945, William Hinton venis al Ĉinio. En Chongqing (Ĉongking) li vidis Kamaradon Mao Zedong, kaj tiu intime elmetis al li multajn demandojn. Reveninte al Usono William Hinton informis tion al Erwin Engst, kiu tiutempe bredis laktobovinojn en sia hejmloko. Forvendinte la bovinojn Erwin Engst decidis iri al Ĉinio, al Yan'an.

Joan Hinton naskiĝis en familio de usona intelektulo. Kiam ŝi finis sian studon en la fizika fakultato de la fame konata universitato Viskonsino, ŝi ricevis magistran titolon kaj partoprenis en esploro kaj farado de atombomboj. En aŭgusto de 1945, usona aerarmeo faligis du atombombojn en Hiroshima kaj Nagasaki, tio rompis ŝian sonĝon pri okupiĝo je scienca esplorado. Ŝi delonge jam koniĝis kun Erwin Engst kaj ŝatis tiun junulon entuziasman, sinceran kaj progreseman. Aŭtune de 1945, ŝi adiaŭis Erwin Engst en Vaŝingtono ekveturontan al Ĉinio. Ŝi amas sciencon kaj pli amas la veron. Ŝi deziris iri la vojon iritan de sia pliaĝa frato William Hinton kaj Erwin Engst.

Foje, ŝi ricevis karan leteron de Erwin Engst el la Limregiono de Shaanxi-Gansu-Ningxia de Ĉinio. En ĝi li entuziasme prezentis al ŝi la grandan batalon de Ĉinio decidontan la sorton de kvarono de la homaro. Ŝi decidis forlasi sian akcelilon kaj iri al Ĉinio.

En februaro, 1949, ŝi atingis Yan'an. En aprilo ŝi kaj Erwin Engst geedziĝis en kavernodomo de Yan'an. La geedziĝo, ĝuste kiel dirita de iliaj ĉinaj amikoj, estas kuniĝo de la vero kaj amo.

ENRADIKIĜI EN KAMPARO

Post la Liberiĝo, la paro volonte restis en kamparo de la Nordokcidenta Altebenaĵo de Ĉinio, esprimante sian decidon servi al la plej multnombra kamparanaro de Ĉinio.

En Caotan-kultivejo de Xi'an



En Wayaopu-agrikulturila fabriko, kuspinte la manikojn ili kune kun laboristoj produktis pioĉojn, sokojn kaj ŝpatojn por kamparanoj de norda Shaanxi. Erwin Engst projektis kaj faris norion tiratan per azenoj kaj ĉaregon tiratan per ĉevaloj. Kaj Joan Hinton projektis baskulĉaron kaj ventomuelilon por kamparanoj.

En la paŝtejo Sanbian proksima al la Interna Mongolio ili bredis laktobovinojn kaj ŝafojn, servis al la mongolaj paŝtistoj per kuracado kaj plibonigo de specioj de bovoj kaj ŝafoj. En tiu loko ofte blovis sablo-vento kaj ili vivis tre malfacile. Same kiel aliaj paŝtistoj ili devis bruligi fekaĵon de bovoj por varmigi la ĉambron kaj triki vestojn kaj ŝtrumpojn el kruda lano. Erwin Engst ĝoje fumis tabakon kulturitan de kamparanoj de norda Shaanxi anstataŭ usona cigaro kaj Joan Hinton amikiĝis kun mongolaj virinoj, kiuj helpis ŝin fari buteron kaj kremaĵon, lernigis ŝin kanti multajn mongolajn kantojn. Nun, ŝi ankoraŭ memoras la scenon ke ŝi kaj ŝia mongola amikino Gala rajdis sur ĉevaloj, kune kantante sur stepo.

Ankaŭ nederlandaj laktobovinoj, kiujn ili protektis ĉiamaniere dum la periodo de la Liberiga Milito, estis translokitaj al la paŝtejo Sanbian kaj en 1955 al Caotan-kultivejo sude de Weihe-rivero. Dank' al zorga bredado de ili kaj aliaj kultivejanoj la nombro de laktobovinoj kreskis de 83 ĝis pli ol 1,000, kaj multaj bonrasaj bovoj estis liveritaj al diversaj lokoj de la tuta lando. Ankaŭ Joan Hinton faris multajn plibonigojn al brutobredaj instrumentoj. Pro sia diligenta laborado ili ricevis plurajn honorajn diplomojn.

De 1946 ĝis 1966, Erwin Engst laboris 20 jarojn kaj lia edzino 17 jarojn en kamparo kaj paŝtejo de la Nordokcidenta Altebenaĵo de Ĉinio. Ili senrezerve oferis sian junecon al la ĉina kamparo kaj faris kontribuon por prosperigi la paŝtan aferon de Ĉinio kaj plibonigi la vivon de la ĉina kamparanaro.

Post 1966, ili estis venigitaj al Beijing kaj laboris pri la angla lingvo. Sed dum tiu tempo ili sentis sin izolitaj de la popolo kaj la vivo kaj petis permeson reveni al kamparo. En 1972 ili venis al Hongxing-komunumo de Beijing kaj laboris en ĝia laktobovino-bredejo. Kvankam iliaj manoj ofte surhavas maŝinan oleon dum la laboro, tamen ili opinias, ke vivi same kiel la

En kamparo de nordorienta Ĉinio

multenombra loĝantaro de Ĉinio kaj sin ĵeti en la socialisman konstruadon estas por ili plej granda ĝojo!

FARI KONTRIBUON POR LA AGRIKULTURA MEĤANIZO

Nun Erwin Engst kaj Joan Hinton jam estas pli-ol-50-jaraj kaj surhavas grizajn harojn je la tempioj, tamen ili ankoraŭ estas viglecplenaj en laboro. Frumatene ili biciklas al laboro, ĉu en vintro aŭ en somero, ĉu en vento aŭ en pluvo. Ili en olemakulitaj laborvestoj laboras en bovstalo aŭ fabriko. Somere Erwin Engst laboras ofte kun nudaj brakoj. En vintro oni ne povas labori oportune, portante vatitajn vestojn, Joan Hinton en maldikaj laborvestoj riparas maŝinojn.



Diskutado pri projekto kune kun laboristo kaj teknikisto

Por meĥanizi melkadon, ili reformis vakuan pumpilon per forĵetita traktora motoro kaj malnovaj maŝinpecoj. Krome, ili ankaŭ reformis fojno-dispecigilon. Ili instalis sur siaj bicikloj saketon por kolekti malnovajn maŝinpecojn uzeblajn, kaj eĉ pecon da drato kaj najlojn. Ili diris ofte al laboristoj: "Por tiel granda lando, ĉiu persono devas ŝpari."

Ili rigardas la socialisman aferon de la ĉina popolo kiel sian propran. En la bovino-stalo de Hongxing-komunumo Erwin Engst renovigis melkan maŝinon. En 1974 li kaj lia edzino kune elfaris fojno-rikoltan kombajnon. Tiam mankis al ili bluplano kaj modelo de tia kombajno, ili foliumis reklamojn de fremdaj landoj pri tia kombajno kaj diskutis projektadon de la kombajno kune kun spertaj traktoristoj. Tage ili prilaboris maŝinpecojn kune kun laboristoj kaj faris skizon nokte. Post klopodado de pli ol unu jaro, unu kombajno finfine ekfunkciis sur maiza kampo de la nomita komunumo.

Ili kaj komunumanoj kunvivas kvazaŭ samfamilianoj.

En 1975 Erwin Engst, kiel sendito de la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Usono, revenis al Usono forlasita de li 30 jarojn. En du monatoj li vizitis 25 urbojn kaj faris en kunvenoj aŭ kunsidoj 89 paroladojn pri la nova Ĉinio kaj lia propra travivaĵo en Ĉinio. En 1977, Joan Hinton faris vizitadon al 54 urboj de Usono kaj 3 urboj de Kanado, kaj faris 198 paroladojn al la usona kaj kanada popoloj pri sukcesoj de la socialisma Ĉinio.

En Vilaĝo de Ŝarba-oj

de **ZHANG XIAOPING**



Kostumoj de ŝarba-oj

EN la sezono kiam pompadis rododendroj, ni veturis al montvilaĝo por viziti ŝarba-ojn.

La ŝarba-a nacimalplimulto kun nur pli ol 900 anoj estas unu el la ĉinaj naciecoj. Ili koncentre loĝas en Zhangmu, Centang, Rongxia, Jilong kaj aliaj lokoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, ĉe la landlimoj ĉina-nepala kaj ĉina-hinda. De longa tempo ili jam vivadas tie. Ili havas siajn proprajn morojn kaj kutimojn, kostumojn kaj parollingvon. En skribado la tibeta lingvo estas uzata de ili.

Nia ĵipo galopis laŭ la ŝoseo Amikeco de Ĉinio kaj Nepalo. Antaŭ unu tago, ni ankoraŭ estis ĉe la norda montpiedo de Himalajo, kie la majesta Ĝomolangma plenkovrata de glacio brilis en la suno, kun variaj ĉarmoj, sed nun ni jam venis al ĝia suda montpiedo, kie prezentiĝas tute alia pejzaĝo kiel tiu en suda Ĉinio: murmuras kristalaj riveretoj, verdas montoj, ŝvebas densaj nuboj, plaŭdas akvofaloj kaj smeraldas bambuoj. Ni vidis de la montotalio, ke Zhangmu-rivero torentas suden sub ĉinstila ponto, kiu interligas la montojn ĉe ambaŭ bordoj. Ĝi estas la ponto Amikeco ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Nepalo, tra kiu libere trafikas popolanoj de la du landoj. Apude, sur verda gazono okulfrape staras ŝtonskulptaĵo "Elefanto kaj Infano". Ĝi simbolas la landlimon kvietan kaj amikan.

Post kiam la ĵipo transiris iun monteton, sterniĝis antaŭ ni vastaĵo: novaj domoj elrigardas en verdaj arboj kaj ŝtuparaj kampoj sur foraj montodeklivoj aspektas kiel smeraldaj pecoj inkrustitaj sur la tero. Kvankam jus komenciĝis la lasta tagdeko de aprilo, tamen hordeo jam flaviĝis kaj kolzoj ore floris kun aromo. Tio estas la vilaĝo de ŝarba-oj.

Ni elaŭtiĝis kaj piediris al la oficejo de Lixin-brigado de Lixin-komunumo, laŭ vojeto borderata de florplantoj. La oficejo estas duetaĝa lignotabula domo, antaŭ kiu estas simpla korbopilka ludkampo kaj ĉirkaŭe estas pir- kaj pom-arboj.

La 33-jara Dawa Zhoma, respondeculino de la brigado, ĝoje akceptis nin malproksimajn gastojn. Ŝi regalis nin per bongusta buterteo kaj *zanba*-o* miksita kun butero kaj sukero. Manĝante kaj trinkante ni aŭskultis ŝian rakontadon pri la brigado.

* Speciala manĝaĵo de tibetanoj, farita el rostita faruno de hordeo.

Ŝarba-oj

La ŝarba-oj estis rigardataj kiel pleboj antaŭ la Liberiĝo. Ili laboris kiel dorsportistoj de generacio al generacio kaj plene suferis tiranadon kaj subpremadon fare de servutulmastroj. Ili manĝis maizkaĉon kaj sovaĝajn legomojn, trinkis teon faritan el folioj kaj radikoj de arboj kaj loĝis en ŝtonkavernoj aŭ kabanoj. Tutjare ili vivis vagan vivon. Ili liberiĝis kune kun la tibetaj servutuloj. Sub zorgo kaj helpo de la popola registaro ili jam havas fiksloĝejojn unuafoje en la historio, kaj ilia vivo pliboniĝas jaron post jaro. En septembro de 1975 la ŝarba-oj kaj aliaj frataj nacimalplimultoj kune fondis la popolan komunumon Luxin.

Post iom da ripozo, gvidate de Cedian Lhamo ni iris sur monton kaj baldaŭ ni jam sin trovis profunde en praarbaro. Tie kreskas ĉielskrapaj arboj, kaj lanugaj musko kaj alispeca vegetaĵo solide kovras ŝtonojn kaj dense pendas sur arboj. Tamen sunradioj pene penetras tra densaj folioj kaj varmigas la teron en la arbaro. En la sunbriloj rododendroj paradas per siaj ruĝaj, blankaj kaj helruĝaj floroj. Ĉie odoras agrabla aromo de sovaĝaj kariofiloj. Subite longa obtuza blekado rompis la silenton de la arbaro. La vojgvidistino diris al ni, ke cervetoj (*Muntiacus*) eliris. Tuj poste aŭdiĝis du pafoj, kaj unu cerveto estis trafita de ŝarba-a ĉasisto. En la arbaro troviĝas ankaŭ granda nombro da ursoj, leopardoj kaj aliaj bestoj.

Nia akompanantino irante plukis diverskolorajn florojn de rododendroj. Same kiel aliaj ŝarba-aj knabinoj, ŝi havas longan harligon kaj portas nigran lanŝtofan robon kaj longmanikan helruĝan subveston kaj orelringojn el oro kaj jado. Ŝiaj okuloj radiis ĝojon. Ŝi estas feliĉa, ke ŝi estis la unua studentino en la montvilaĝo. En 1977 ŝi finis sian studadon en la Centra Instituto de Nacimalplimultoj en Beijing kaj revenis al la hejmloko. Krom la ŝarba-an ŝi povas paroli flue ankaŭ la tibetan kaj la komunan han-an lingvojn. Ŝi diris al ni: "Kiam mi jus eniris en la Centran Instituton de Nacimalplimultoj, mi eĉ ne povosciis skribi mian nomon. Sub helpo de instruistoj kaj kunlernantoj, mi akiris klerecon kaj samtempe

pliprofundigis mian amon al la patrujo. Dum la kvar jaroj de mia foresto multe ŝanĝiĝis mia hejmloko. En la tago kiam mi revenis hejmen, mi vidis, ke multaj ŝarba-oj jam translogiĝis en novajn domojn; la disaj parceloj de la brigado estas jam kunigitaj en grandajn pecojn; sur montodeklivoj konstruiĝis ŝtuparaj kampoj; pomarboj plantitaj antaŭ kvar jaroj nun jam komencis doni fruktojn. Vidante tion mi tre ĝojis. En la komencaj tagoj post la reveno mi ne povis resti hejme kaj tuttage vagis sur la montoj. Mia hejmloko, same kiel aliaj lokoj de la tuta patrujo, plenas je espero."

Mi emociiĝis de ŝia rakontado. Riveretoj murmuras inter montoj kaj birdoj gaje pepas kvazaŭ prikantante la feliĉan vivon de la ŝarba-oj. La paŝtejo kvazaŭ verda tapiŝo etendiĝas foren; tie bovoj kaj ŝafoj sin nutras per delikataj herboj. En bambua kabano ĉirkaŭata de verdajoj, iu ŝafistino kuiris teon kaj kirlis freŝan lakton por prepari buteron. Ĉirkaŭ la kabano estis metitaj bambuaj matoj, korboj kaj kestoj delikate plektitaj de ŝi mem. Arbohakado kaj farado de bambuaj plektaĵoj estas la ĉefaj flankokupoj de la vilaĝo.

Elirinte el la arbaro, ni venis al la hejmo de la brigadestro Dainzeng Nobu, laŭ vojo plena de florplantoj ĉe ambaŭ flankoj. Li loĝas en nova duetaĝa ligna domo. En la supra etaĝo estas kvar helaj ĉambroj. La mastro, kiu ĵus finis sian tagmanĝon, varme invitis nin sidiĝi ĉirkaŭ forno kaj regalis nin per bonodora dolĉa buterteo kaj rostitaj riz- kaj maiz-grajnoj ŝatataj manĝaĵoj de la ŝarba-oj. Krome infanoj de la mastro alportis rizan vinon por ke ni gustumu ĝin.

Ĉe la forno ni ĝue trinkis la teon kaj senĝene paroladis pri ŝanĝiĝo de la montvilaĝo. La brigadestro en ŝaflana veŝto kun hakilo ĉe la talio aspektas tre brava. En la malnova socio li tuttage laboregis por sia servutulmastro, sed ne povis ricevi 0.5 kg. da rostita hordeo. Nun lĩ gvidas pli ol 160 kamparanojn de la tuta vilaĝo en konstruado de la nova vivo. Ili okupiĝas samtempe pri agrikulturado, paŝtado, flankokupoj, legoma kaj fruktarba kulturado, kaj ilia produktado rapide disvolviĝas. Nun novaj agrikulturiloj, inkluzive de traktoro, anstataŭis la primitivajn instrumentojn. En la lastaj jaroj, la enspezo de la vilaĝo kreskadis senĉese, kaj ĝia komuna fonduso jam atingis pli ol milionon da juanoj. Ili ankaŭ fondis sian unuan elementan lernejon, kaj 90% de la infanoj vizitas ĝin. Iuj junuloj estis senditaj al Beijing kaj Lhasa (Lasao), por studi tie en altaj lernejoj. Krome ili havas siajn hospitalon, kuracistojn kaj ĝuas senpagan kuracadon. La popola registaro liveras grenon, oleon kaj salon al la vilaĝanoj, instalis por ili telefonon kaj fadenajn megafonojn, tiel ke oni povas ĉiutage aŭdi la voĉojn de Radio Pekino malgraŭ tre longa distanco. La brigadestro diris ankaŭ, ke kvankam la ŝarba-oj estas



Ŝarba-aj virinoj en plektado de korbo

Kuracistinoj de ŝarba-oj en studado de anatomio

malmultaj, tamen ili havas siajn reprezentantojn en diversnivelaj registaroj, kaj tri el la vilaĝanoj laboras respektive kiel membroj de la Revolucia Komitato, la Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj la Komitato de Komunisma Junulara Ligo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono. Dum nia babilado venis al ni najbaroj unu post alia. Dainzeng Nobu ĝoje ekludis kordan muzikilon kaj kune kun la venintoj ekkantis tostan kanton.

Falis la nokta kurteno. Freŝa zefiro alblovis kaj pinarboj susuris. Post finiĝo de la taga laboro la ŝarba-oj kolektiĝas kaj kantas kaj dancas duaŭ triope en akompano de korda muzikilo kaj bambua fluto. Iliaj kantoj havas belajn kaj fluajn melodiojn kaj iliaj dancoj karakteriziĝas per tio, ke la viroj movadas sian trunkon kaj la virinoj faras turniĝojn, dum movado de la kruroj kaj piedoj. Kiel ĉarma estis la nokto ĉe Himalajo!

HISTORIAJ OBJEKTOJ



Restadejo de primitiva socio ĉe Hemudu en prifosado

Restaĵoj de Primitiva Socio de Hemudu

de **YUEMIN**

ARKEOLOGOJ de Ĉinio trovis restaĵojn de primitiva socio antaŭ 7,000 jaroj ĉe Hemudu-vilaĝo de Yuyao-gubernio de Zhejiang-provinco (Ĝegiang).

La tereno de la antikvaj restaĵoj okupas areon de ĉ. 40,000 kvadrataj metroj kaj konsistas el kvar kulturaj tavoloj interrilatantaj unu super alia. Dum la prifosado oni trovis proksimume 7,000 relative kompletajn pecojn de ŝtonaj, fajencaj, ostaj kaj lignaj iloj, el kiuj pli ol duono estas ostaj iloj uzataj en produktado kaj vivo. Tiuj elterigitaj objektoj en granda kvanto montris, ke frue antaŭ 6,000 - 7,000 jaroj niaj praavoj jam havis brilan primitivan kulturon ne nur en la baseno de Huanghe-rivero (la Flava Rivero), sed ankaŭ en tiu de Changjiang-rivero (Jangzi). Tio ŝanĝis la malnovan vidpunkton, ke

la kulturo de suda Ĉinio disvolviĝis malpli frue ol tiu de centra Ĉinio.

La vilaĝo Hemudu situas en ebenaĵo de akvoriĉa regiono, kie la subtera akvonivelo estas relative alta. La malsupra duono de la restadejo fermiĝis en tertavolo sub akvo, tial multaj antikvaĵoj relative bone konserviĝis.

Rizo estas grava eltrovaĵo inter la malkaŝitaj antikvaj restaĵoj de Hemudu. Rizo, rizŝeloj, rizplantaj tigoj, ligneroj kaj pecetigitaj fragmitaj tigoj intermiksitaj troviĝas ĉie en la prifosita loko kaj ilia tavolo dikas pli ol 50 centimetrojn, kaj ie eĉ pli ol unu metron. Inter ili iuj rizplantoj, rizgrajnoj, rizŝeloj kaj senŝeligitaj rizgrajnoj estis bruligitaj ĝis karbiĝo, nervuroj kaj radiketoj de iuj rizplantoj estas ankoraŭ klare videblaj, iuj rizŝeloj ankoraŭ surhavas pinton kaj lanugojn en freŝa koloro. Post ekspertizo oni konstatis, ke tiuspeca rizo estis ne sovaĝa. Ĝi estas la plej frue kulturita rizplanto ĝis nun trovita en nia lando.

Inter la elterigitaj antikvaĵoj estas ostaj kaj lignaj *lejsi*-oj — iloj similaj al ŝovelilo por fari sulkon en kulturado de rizo. La ostaj *lejsi*-oj estis faritaj el skapoloj de grandaj mamuloj. En la kvadrata tenila ingo de iuj ostaj *lejsi*-oj ankoraŭ troviĝas rompita ligna tenilo volvita per liano. En antikvaj literaturoj de nia lando troviĝas multaj notoj pri *lejsi*-oj, sed tiu ĉi estas la unuafoja eltrovo de ostaj *lejsi*-oj en granda kvanto. La elterigitaj ostaj *lejsi*-oj montris, ke tiamaj homoj jam eniris en novan etapon de agrikulturado.

La produktaj iloj elterigitaj ĉe Hemudu estas ĉefe ostaj. El ili sin trovas *lejsi*-oj uzataj en agrikultura produktado, skrapiloj, pingloj, tubaj pingloj kaj navedoj uzataj en ŝpinado kaj teksado, fajfiloj kaj diversaj sagpintoj uzataj en ĉasado.

La neglazuritaj fajencaĵoj elterigitaj el la tria kaj kvara tertavoloj ĉe Hemudu plejparte estas nigraj fajencaĵoj de simpla plastiko entenantaj karberojn, tute manfaritaj, kies muroj estas dikaj. El la unua kaj dua tavoloj oni trovis ruĝajn kaj grizajn sablohavajn fajencaĵojn, ruĝajn argilecajn fajencaĵojn kaj grizajn kaj nigrajn fajencaĵojn de progresinta tekniko. La karberhavaj fajencaĵoj estas ĉefe potoj por

Arkeologoj ordigas elterigitajn objektojn.

kuirado aŭ entenado de aĵoj, kuvoj kaj pelvoj. En fundo de iuj kuirpotoj postlasiĝis nigraĵoj de manĝaĵoj bakitaj per fajro.

La elterigitaj lignaj iloj estas tre multaj, inter ili estas ĉefe tranĉiloj, lancoj, bastonoj, skrapiloj, remiloj, cilindroj, bovloj, pelvoj, batiloj kaj marteloj. En la tria kultura tertavolo troviĝas unu bela ligna bovlo kun melona ventro kaj ringformaj piedoj, ŝmirita ene kaj ekstere per karmezina kolorilo, kies fizika karaktero egalas al tiu de lako.

Alia grava eltrovaĵo estas restaĵoj de antikvaj konstruaĵoj de ligna framo ĉe Hemudu. Ili montris, ke antaŭ 6,000-7,000 jaroj la Hemuduanoj jam havis la kondiĉon por fiksa loĝado. Miloj da lignaj konstruaj pecoj estis elterigitaj. La tereno de la iamaj lignaj konstruaĵoj en la frua periodo de la Hemudu-a kulturo estis vasta, sur ĝia bazo bonorde viciĝas lignaj palisoj. Tiu longa domo etendiĝas 20-30 metrojn. La postlasitaj lignaj konstruaĵoj estas tre valoraj por studi la antikvan konstruan historion kaj la antikvan loĝstaton de nia lando.

La multeco de la animalaj skeletoj kaj plantaj restaĵoj elterigitaj ĉe Hemudu en specoj kaj kvanto estas malofte vidita en la trovitaj neolitikaj homrestadejoj de nia lando. Inter la trovitaj pli ol 50 specoj de animalaj skeletoj troviĝas tiuj de porko, hundo kaj bubalo, kiuj pruvas, ke tiamaj homoj jam bredadis bestojn. Krome troviĝas ankaŭ tiuj de tigro, elefanto, rinocero, cervo, testudo, fiŝo kaj aliaj. Oni trovis ankaŭ amasojn da kvarksemoj, akvokaŝtanoj, jujuboj, persikoj, fungoj, algoj, lagenarioj kaj aliaj.

La kulturo de Hemudu enhavas sufiĉe belajn artaĵojn. Gravurado, knedado kaj kungluado estis la ĉefaj



Elterigitaj produktiloj el ŝtono



Eburaj skulptaĵoj elterigitaj

formoj de ĝia arto. Ĝiaj desegnoj ĝenerale estas geometriaj kaj la figuroj realismaj. La geometriaj desegnoj simple formitaj el fluaj mallongaj kaj oblikvaj linioj gravuritaj sur ostaj, fajencaj kaj lignaj iloj estas elegantaj. La realismaj figuroj estis laŭplaĉe kneditaj en troiga maniero kun riĉa imagipovo. Inter ili troviĝas kurantaj bestoj, manĝantaj brutoj kaj kuŝanta hundeto ĉe pordo, ĉiuj plenaj je vivetoso. Estas menciinde, ke 20 eburaj skulptaĵoj estis trovitaj en la tria kaj kvara kulturaj tertavoloj. Inter ili estas papiliforma ilo, sur kies du aloj gravuriĝis po desegno de flugonta birdo kun levita kapo.

TUTLANDA RELIGIA ESPLORA KUNVENO OKAZIS EN KUNMING

Lastatempe okazis en Kunming, la ĉefurbo de Yunnan-provinco, la Unua Tutlanda Religia Esplora Kunveno de Ĉinio, kiun ĉeestis pli ol 100 instruituloj, profesoroj, instruistoj kaj gvidantaj kadroj.

Nombro da fakuloj prezentis siajn atingojn en esplorado de budhismo, lamaismo, taoismo, islamo kaj kristanismo kaj elmetis siajn opiniojn kaj proponojn pri religia studo.

La kunveno ankaŭ ellaboris planon de tutlanda esplorado pri religioj por la periodo de 1979 ĝis 1985 kaj fondis la Ĉinan Religian Asocion.

ALIA MEMORŜTONO ELFOSITA EN XISHA-INSULARO

Mardefenda trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo garnizonanta en Dongdao-insulo de Xisha lastatempe elfosis en ĝia nordorienta mara malprofundaĵo apud rifo oblongan ŝtontabulon kun ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj "Memore al la inspektado".

Tiu memorŝtono kun longeco de 78 centimetroj, larĝeco de 28 centimetroj, dikeco de 6 centimetroj kaj pezo de 30.5 kilogramoj estis farita en 1902 p.K. (la 28-a jaro de la regperiodo de Guangxu en Qing-dinastio).

Laŭ historia literaturo, en la dinastioj Ming (1368-1644) kaj Qing (1644-1911) la ĉina registaro multfoje ekspedis sian mararmeon al la insularoj Xisha, Dongsha kaj Nansha por patroli la marteritorion. La senditaj trupoj metis sur la ĉefaj insuloj ŝtontabulojn kun la ĉinaj ideografiaĵoj "Memore al la inspektado". Similajn ŝtontabulojn la ĉina popolo antaŭe jam elterigis plurfoje en la insularo Xisha.

BOATFORMA ĈERKO ANTAŬ DU MIL JAROJ

Arkeologoj trovis boat-forman ĉerkon faritan antaŭ pli ol du mil jaroj en la pitoreskejo de Wuyi-monto en la nordokcidenta parto de Fujian. Anstataŭ esti enterigita kiel multaj antikvaj tomboj trovitaj en Ĉinio, ĝi kuŝis en kaverno sur klifo apud monttorento. La kaverno troviĝas je 51 metroj super la klifopiedo kaj ne estas atingebla por ordinaraj homoj. La arkeologoj sukcesis eniri en ĝin helpe de moderna gruo.

Post unuapaŝa esplorado oni konstatis, ke tiu ĉerko metiĝis en la kavernon en la periodo de dinastioj Qin (221-207 a. K.) kaj Han (206 a. K.-220 p. K.). Unu fino de la ĉerka kovrilo jam difektiĝis kaj la ĉerkoflanko frontanta al la kaverno iom putriĝis. Ĉiuj ĝiaj aliaj partoj estis en bona stato. Interne de la ĉerko estis bone konservita homa skeleto.

La arkeologoj opinias, ke entombigo per tia boat-forma ĉerko estis speciala moro de la antikva popolo en tiu regiono.

GRANDA KOMPUTERO SUKCESE FARITA EN ĈINIO

Lastatempe la Huadong-a Kalkulteknika Esplora Instituto sukcese provfabrikis la unuan ĉinan grandan komputeron de integra cirkvito kun operacia kapablo de 5,000,000 fojoj en ĉiu sekundo. Ĉiuj ĝiaj elementoj estis produktitaj de nia lando. Ekspertizado montris, ke ĝi funkcias bone kaj stabile kaj atingis la projektitajn normojn. Pli ol 50 unuoj de la tuta lando aktive faris kontribuon al la fabrikado de la maŝino.

LA BEIJING-SHANGHAI-A FERVOJO FARIĜIS DU-TRAKA

La Beijing (Pekino) - Shanghai (Ŝanhajo)-a Fervojo kunliganta la nordan kaj sudan partojn de Ĉinio fariĝis nun du-traka kaj duobliĝis ĝia transporta kapablo. En la pasinteco plejparto de la fervojo kun totala longeco de 1,300 kilometroj estis unu-traka.

La dutrakiga konstruado komenciĝis en majo de 1975, kaj en 1978 oni jam plenumis trakometadon kaj instaladon de aŭtomataj kaj elektraj ekipaĵoj kaj konstruis 7 pontojn kun totala longeco de 10,657 metroj inkluzive de la ponto super Huanghe-rivero (la Flava Rivero).

Nun en Ĉinio iras ankaŭ konstruado por dutrakigi la fervojojn Beijing - Guangzhou (Kantono) - an, kiu ligas la nordan kaj sudan partojn de Ĉinio, kaj Lanzhou (Langŏu)-Lianyungang-an, kiu ligas la okcidentan kaj orientan partojn de Ĉinio.

HIDROELEKTREJO SUR XIER-RIVERO

La hidroelektrejo sur Xier-rivero de Yunnan-provinco jam estas parte finkonstruita kaj malfermiĝis al produktado, kaj ĝiaj aliaj partoj estas nun en streĉa konstruado. La elektrejo konsistas el 4 ŝtupoj kun totala kapacito de 255,000 kilovatoj. Nun jam estis instalitaj 6 genera-

toroj kun kapacito de 75,000 kilovatoj.

La elektrejo ludas grandan rolon en disvolvo de industrio kaj agrikulturo de la Dali-a Baj-nacieca Aŭtonoma Subprovinco loĝata de baj-oj, ji-oj, huj-oj, tibetanoj kaj hanoj, kaj pli ol 160 fabrikoj kaj minejoj estis fonditaj en la subprovinco, kiu havis en la pasinteco tre malfortan bazon de industrio.

AMIKA LIGIĜO INTER BEIJING KAJ TOKIO

Je la 14-a de marto pli ol mil urbanoj de Beijing solene kunvenis por varme celebri oficialan establon de amika ligiĝo inter Beijing kaj Tokio. Tio estas nova paŝo por disvolvi laŭplanajn kaj organizitajn amikajn kontaktojn inter la ĉefurboj de Ĉinio kaj Japanio kaj aldonis novan enhavon al la historio de amika rilato inter ambaŭ landoj.

Akompanate de Lin Hujia, la estro de la Revolucia Komitato de Beijing, la Tokia Amika Delegacio, kiu venis al Beijing por subskribi interkonsenton pri la establo de amika ligiĝo inter Beijing kaj Tokio kaj celebri la nomitan aktivadon, plantis en la parko Ĉiela Altaro du neĝpinojn el Himalajo simbolantajn senvelkan amikecon inter la popoloj de la ĉefurboj de Ĉinio kaj Japanio.

KUNLABORO DE AKUPUNKTURISTOJ DE ĈINIO KAJ JUGOSLAVIO

Laŭ la interkonsento de la Ministerioj de Publika Sano de Ĉinio kaj Jugoslavio, tri akupunkturistoj de la Ĉina Ĉinmedicina Instituto faris instruadon en Jugoslavio dum kvar monatoj kaj atingis bonan sukceson. Pli ol 40 jugoslavaj kuracistoj kun certa klinika sperto kaj relative alta teoria nivelo studis en la kurso. Post finiĝo de la studado ili jam povas memstare fari kuracadon per akupunkturo.

En la kunlaboro la ĉinaj kaj jugoslavaj kuracistoj starigis inter si profundan amikecon kaj ili esperas, ke daŭros ilia kunlaboro.

VIZITO DE BRITA TURISMA ŜIPO AL DALIAN

La brita turisma ŝipo "Reĝino Elizabeth II" kun 1154 turistoj el 24 landoj kaj regionoj veturis tra Xianggang (Hongkong) kaj atingis Dalian en la mateno de la 10-a de marto.

La nomita turisma ŝipo por tutmonda vojaĝo estis finkonstruita kaj lanĉita en majo de 1969 kaj la reĝino de Britio persone nomis ĝin per sia nomo.

Por ĉifoja tramonda vojaĝo, la ŝipo ekveturis de Usono je la 18-a de januaro. Laŭ la plano ĝi trapasos 27 havenojn de 20 landoj kaj regionoj. Dalian estis la 14-a haveno vizitita de ĝi en la vojaĝo. La turistoj pririgardis la urbon, ekskursis al pitoreskejoj kaj vizitis fabrikojn kaj lernejojn. Vespere de la 11-a de marto la ŝipo forlasis Dalian kaj veturis al Japanio.

EKSPOZICIO DE SVEDAJ PENTRAĴOJ KAJ SKULPTAĴOJ EN BEIJING

La nomita ekspozicio okazis marte en Beijing, en ĝi estis ekspozataj pli ol 80 elstaraj verkoj de 7 fame konataj svedaj pentristoj kaj skulptistoj en la periodo de la fino de la 19-a jarcento ĝis la komenco de la 20-a jarcento. Ĝi montris la turniĝon de la sveda pentrarto de romantikismo al realismo kaj vekis grandan intereson ĉe la rigardantoj.



Turisma ŝipo "Reĝino Elizabeth II" ĉe la haveno Dalian



Turistoj aĉetas metiartaĵojn en la urbo Dalian

ESP-NOVAĴOJ

REVIGLIĜAS LA E-GRUPO EN CHONGQING

En oktobro de 1978, denove vigliĝis la E-grupo en Chongqing, Sichuan-provinco kaj aktive disvastigas Esperanton en sia urbo. En januaro de la kuranta jaro, ĝi eldonis sian periodaĵon "Verda Stelo", en kiu aperis informoj pri enlandaj E-grupoj kaj rubrikoj pri lernado, instruado kaj gramatiko.

En februaro, tiu grupo fondis E-kurson kun 20 lernantoj. Post la fino de tiu kurso en julio, oni komencos la duan kurson.

Esperanta grupo en Chongqing

E-KURSO SUB LA GVIDO DE ISLANDA STUDENTO

La 9-an de marto, islanda studento S-ro Ragnar malfermis liberhoran E-kurson en la Beijing-a Universitato. Tiutage Kiugi, membro de la Konstanta Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo, ĉeestis la inaŭguron por esprimi sian gratulon. En sia parolado, li prezentis al la kursanoj la kaŭzon de lia lerno de Esperanto kaj pri lernometodo. En tiu kurso lernas 14 studentoj, el kiuj la plejparto venis de la fakultatoj de la ĉina literaturo, filozofio kaj kemio. Inter ili sin trovas ankaŭ studento el Malto. La kurso havas lecionon vespere de ĉiu mardo kaj vendredo, ĉiufoje por du horoj.

S-ro Ragnar venis al Ĉinio en oktobro de 1975 por studado kaj foriros en ĉi-somero post sia diplomitiĝo. Do la E-kurso estas signo de amikeco kaj memorajo de islanda esperantisto al la ĉinaj esperantistoj.

Ragnar helpas kursanojn en lernado

E-KURSO EN LA LINGVA INSTITUTO DE BEIJING

Meze de marto, komenciĝis Esp-kurso liberhora en la Lingva Instituto de Beijing. La 15 lernantoj en ĝi estas plejparte instruistoj kaj oficistoj de tiu instituto. Inter ili estas spertaj instruistoj kaj filologiaj laborantoj. Krome aliĝis ankaŭ instruistoj kaj oficistoj de aliaj lernejoj. La kurso donas lecionon en vespero de ĉiu mardo kaj vendredo.

La kurso estas gvidata de juna esperantisto Zhang Haiping, kiu diplomitiĝis de la Esperanto-kurso de la Radiodisaŭdiga Instituto de

Beijing en 1965. Lia viveca instruado estas tre ŝatata de la kursanoj.

ESPERANTISTOJ DE KVAR LANDOJ EN BEIJING

En la fino de marto kaj la unua duono de aprilo esperantistoj de kvar landoj vizitis Beijing unuj post la aliaj. La plejparto el ili venis kiel membroj de turismaj grupoj, dum unu japana amiko gastis ĉi tie laŭ invito de Radio Beijing.

Tiuj esperantistoj estas: S-ro Sune W. Ahlm de Svedio, ges-roj Edwin kaj Helen Hammock de Usono kun ilia filino, f-ino Jeanne Perra de Francio kaj s-ro Muramacu Jukijoŝi de Japanio, kiu faris sian duan viziton al Ĉinio.

La vizito de ĉiuj tiuj esperantistoj estis ĝojiga evento por la ĉina esperantistaro en Beijing. Tio ankaŭ plue pruvis, kiel valoran rolon Esperanto povas ludi en la interkomprenigo kaj amikigo de diverslandaj popoloj.

DENOVE POŜTMARKO PRI UK

La svisa poŝto eldonos specialan poŝtmarkon pri la 64-a UK kun bildo de la svisa varmaera Esperanto-balono. La poŝtmarko, laŭ decido, aperos la 21-an de feb. 1979 en kvanto inter 10 kaj 15 milionoj, havas valoron de 0,70 SFr., kiu taŭgas por sendi poŝtkarton al eksterlando. La poŝtmarko kaj pluraj rilataj filatelaĵoj (oficiala unuataga koverto ks.) estas mendeblaj ĉe Filatela Servo Esperanto-Balono per speciala mendilo aldonita al la Dua Bulteno.



Zhang Haiping en instruado

LA 64-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

(Lucerno, Svislando, 1979 07 28—08 04)

Ĝi jam notis centojn da aliĝintoj el trideko da landoj. En ĝi denove okazos Esperantologia Konferenco pro la granda populareco en la 63-a UK en Varna. Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Adreso de LKK: Esperanto, poŝtfako 14, CH-6512 Giubiasco, Svislando.

LA 3-A INTERLINGVISTIKA LABORKONFERENCO

La nomita konferenco okazis en Paderborn, FR Germanio, de la 23-a ĝis la 26-a de lasta novembro, pri la temo "Interlingvistiko en scienco kaj klerigo". Oni traktis precipe la elementlernejan instruadon de la Internacia Lingvo. La freŝaj rezultoj de la ĵus finita eksperimenta instruado de Esperanto en tiu regiono estis analizitaj. Montriĝis pozitiva influo de la lernado de Esperanto al rezultoj en aliaj studoj. La esperantistaro certe atendas la eldonon de rezulto de la pritrakto de la konferenco.

DELEGACIO DE UEA AKCEPTITA DE LA ĜENERALA DIREKTORO DE UNESKO

Dum mallonga restado inter du eksterlandaj vojaĝoj, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro Amadou M'Bow, akceptis en sia oficejo en Parizo kvarpersonan delegacion de UEA gvidatan de d-ro Humphrey Tonkin la 8-an de januaro.

Dum la duonhora konversacio, la delegacio havis okazon ĝisdatigi la scion de la Ĝenerala direktoro pri la progreso de la Esperanto-movado kaj UEA, kaj esprimi sian deziron, ke Unesko pli sisteme esploru la malhelpojn al la baza, interpersona komunikado.

S-ro M'Bow konsentis, ke tiu baza komunikado estas ege grava. Ĝia manko en nia moderna teknologia socio kaŭzas ĉie paneojn kaj perfortojn. "En kelkaj tradiciaj socioj," li asertis, "la komunikaj kanaloj pli bone funkcias ol en teknologiaj socioj."

SVISA RADIO ĈIUTAGE

La Svisa Radio elsendos dum la kongresa semajno ĉiutage en la lingvo internacia, same kiel ĝi faris dum la 32-a UK en Berno (1947), kiam komenciĝis la svisaj esperantlingvaj elsendoj.

NOVE TROVITA ZONO DE METALAJ MINERALOJ

Ĉe la limo de Yunnan (Junnan), Sichuan (Siĉuan), Tibeto kaj Qinghai (Kinghaj) de nia lando oni trovis zonon de multaj specoj de metalaj mineraloj, kiu longas de sudo al nordo pli ol 1,900 kilometrojn kaj havas areon de ĉ. 550,000 kvadrataj kilometroj.

En tiu zono, mineraloj de fero, kupro, plumbo, zinko, stano, hidrargo, antimono, volframo, molibdeno, nikelo, metaloj de la familio de plateno kaj raraj metaloj prezentas vastan perspektivon. Krome, tie troviĝas abunde ankaŭ nemetalaj mineraloj kiel pirito, kalia salo, glimo, asbesto, gipso, arseno, magnezito kaj kalkoŝtono. Samtempe oni trovis tie ankaŭ riĉan fonton de subtera varmo.

LA ĈINA CENTRA FILHARMONIO EN INTERNACIA KANTO-FESTIVALO

En januaro de la kuranta jaro, la Centra Filharmonio partoprenis en la Internacia Kanto-festivalo en la Filipinoj, en kiu sin prezentis kantistoj el 11 landoj de Azio, Eŭropo kaj Latin-ameriko.

Plejparto de la pli ol 140 kantistoj de nia Centra Filharmonio estas edukitaj de konservatorioj kaj praktikis sian arton dum pli ol 20 jaroj. Ilia repertuaro konsistas el centoj da novaj kaj malnovaj kantoj ĉinaj kaj fremdlandaj. Parto de ili partoprenis en la festivalo kaj ilia prezentado de 20 kantoj ricevis laŭdojn de la spektatoroj.

NOVA FER-TITAN-APARTIGA PROCEDO

La nomita procedo trovita de nia lando estas jam aplikata en industria produktado.

Antaŭ pli ol 100 jaroj, en eksterlando jam komenciĝis esplorado pri tiu tekniko. Entenante skorion kun ĉ. 10% da titana dioksido altfornego ĝenerale povas funkcii normale, kaj se la kvanto de titana dioksido superas tiun limon, produktado ne povas daŭri.

Nia lando komencis serĉi fer-titan-apartigan procedon ekde la jaro 1958. Nun la fandado povas daŭri normale, eĉ kiam la skorio en la altfornego entenas 30% da titana dioksido. Tio havas gravan signifon por ekspluati la grandan kvanton da V-Ti-entena magnetito kun altpocenta titano en nia lando.

Nove Ricevitaj Libroj:

La Ergokrata Evangelio eldonita de Matthias kraintschan, A-1060 Wien, Stumperg. 63/14, Aŭstrio.

Standard-Gramatike del International Auksiliari Lingvue (INTAL), plia projekto de internacia lingvo.

Lazur' Kristala kaj Pluv' Susura (poemaro), Utaaro de Masayuki kuroda, eldonita de l' Omnibuso. La aŭtoro akiris la 2-an premion en Belarta Konkurso de la 50-a UK en Tokio 1965.

Japana Variacio, kolekto de prozoj kaj poemoj originale verkitaj de japanaj esperantistoj, kunmetita de Miyamoto masao kaj Uyeama masao kaj eldonita de l' Omnibuso.

La Revizoro, reprodukto de la dua eldono de la fama komedio de Gogol tradukita de Zamenhof. Ricevebla ĉe Japana Esperanta Librokooperativo.

La Danĝera Lingvo, verkita de U. Lins pri Esperanto en la uragano de persekutoj, kaj aperigita de l' Omnibuso en 1973.

El Unu Verda Vivo, poemoj de W. Auld, eldonita de Lingvoponto, Kuopio 1978, en formato A5 kun 44 p.

La Kanto pri Fajr-ruĝa Floro, kiun elfinnigis E. Kuoppala kaj J. Jantt kaj eldonis Finna Esperanto-Librejo en formato B5 kun 131 p.

La Planedo Papagio, Lirika Prozo kaj **Arto Mallerni**, tri samformataj broŝuretoj verkitaj de A. Lopez Luna kaj eldonitaj de Amigos de Lopez Luna, Buenos Aires, Argentino.

Ami Sciencon de la Infaneco

Mi farigos piloto.



Modelo de ŝipo naskigos.

Lernantoj de la Unua Mezlernejo de Shuangfeng studas transformatoron en la fabriko funkciigata de la lernejo.

Diversaj modeloj faritaj de lernantoj de Wengelernejo de Changsha

ernantoj faras meteoobservadon
ost lernohoroj.

Aviadilaj modeloj faritaj de lernantoj de la 12-a mezlernejo de Changsha

Lernantoj de la 22-a Mezlernejo de Changsha en kemia eksperimento



Xie Yanbo, 12-jara studento de la Ĉina Scienc-Teknika Universitato, faras operacion.

Mezlernejanoj en muntado de transistoro

FOTOJ PRI NATURAJ BELAĴOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

de F-ino Dorothy E. Keeble, Kanado

Akvolilio

Aŭtuno apud la rivereto Herbert

Vaksa Tinkturado

de **Fu Mulan**

En Guizhou (Gujĝoŭ)-provinco en sudokcidenta Ĉinio loĝas mjaŭ-oj, jaŭ-oj, buji-oj, golaŭ-oj kaj aliaj laboremaj naciecoj kun longa historio de kulturo. La vaksa tinkturado estas unu el la artoj kun naciaj karakterizaĵoj kreitaj de ili.

La metodo de vaksa tinkturado estas simpla: unue fari sur ŝtofo flordesegnojn per kupra desegnilaro kaj likvigita vakso kaj poste ĝin tinkturi. La vaksaj desegnoj estas netinktureblaj, tial post tinkturado la ŝtofo surhavas blankajn desegnojn.

Se vi promenas en vintra vespero en mjaŭnacieca vilaĝo kun aparta stilo, vi povas vidi mjaŭ-ajn junulinojn farantajn vaksan flordesegnadon. Sidante tri- aŭ kvin-ope ĉirkaŭ forno, ili babilas kaj kantas pri siaj idealoj kaj voloj, kaj dume verŝas siajn sentojn en la desegnojn. En la tradiciaj festotagoj aŭ en geedziĝa ceremonio, la junulinoj, portantaj mem kudritajn vestojn el vakstinkturitaj ŝtofoj kaj brilajn arĝentajn ornamaĵojn, ĝoje dancas akompanate de bambua buŝharmoniko.

Mur-ornamo

Korbo kun Floroj kaj Fruktoj



Monsaketoj



Desegno sur naztuko



Mansako

Ŝtonaj Skulptaĵoj



En Arbaro

Argilaj Modlaĵoj

Sorgo

Kantado pri la Nova Tibeto



Reveno post Kuracado

Malgrandaj Kantistoj

Eksplodigi Petardojn
por Celebri la Venkon